Driemaandelijks tijdschrift
Afgiftekantoor: Antwerpen X. ISSN 1013-2031

IPR
INTERNACIA PEDAGOGIA REVUO

Jarkolekto 38 - trimonata
08/4

Redakta komitato:
Jozefo Németh (red.)
Luiza Carol
Luiza Oberrauch Madella
Rob Moerbeek

Kunlaborantoj de la aktuala numero:
Sjoerd Bosga
Aida Cizikaite
Renato Corsetti
Nina Daniljuk
Ilona Fedor
Francois Hounsounou
Zsófia Kóródy
Ilona Koutny
Stefan MacGill
Atilio Orellana Rojas
Aleksander Osincev
Leonardo Pampaloni
Johano Petik
Radojica Petrovic
Raita Pyhala
Edit Slezákné Tar



ilei
Organo de Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj

En 2009 ni konferencos en Krakovo **(p. 34)**

ENHAVO

Radojica PETROVIĆ: *Plu* ... 4
Intervjuo kun Ilona KOUTNY ... 8
Ilona KOUTNY: *Nova jardeko de Interlingvistikaj Studoj en UAM* ... 12
Zsófia KÓRÓDY: *Trejnado de Esperanto-instruistoj, kursgvidantoj* ... 13
Aida ČIŽIKAITĖ: *Konferenco en Amsterdamo* ... 15
Aleksander OSINCEV: *"Flugiloj de malfacila vento" dum IJK, Hungario* ... 17
Edit SLEZÁKNÉ TAR: *Fulmkursoj en Vieno* ... 18
François HOUNSOUNOU: *Rondkurso de Vlad'ka CHVÁTALOVÁ en Benino* ... 19
Raita PYHÄLÄ: *Pri finnlandaj lernejoj kaj PISA* ... 21
El la landoj kaj sekcioj (CN, DE, HU, IT, UA, VN) ... 23
Ĉu defetismo, aŭ io alia? (Reago de Johano PETIK) ... 27
Misfrazoj (Rob MOERBEEK) ... 28
Por via notlibro ... 29
Estrarkunsido en Krakovo (Atilio ORELLANA ROJAS) ... 33
Informilo kaj aliĝilo por la 42-a ILEI-Konferenco en Krakovo ... 34

ESTRARO DE LA LIGO

Prezidanto: Radojica PETROVIĆ, *Bul. oslobodjenja 36/14, RS-32000 Čačak, Serbio. Tel. (+381 32) 371053, fakso: (+381 32) 342101, <radp@ptt.yu>.* Kunordigado, eksteraj rilatoj, la projekto InterKulturo.

Sekretario: Atilio ORELLANA ROJAS, *Riouwstraat 172, NL-2585 HW Den Haag, Nederlando. Tel. (+31 70) 3556677, <atilioorellanarojas@gmail.com>.* Sekretariaj taskoj. Ekzamenoj.

Estrarano pri financoj: Sjoerd BOSGA, *Tråddragargatan 27D, SE-723 37 Västerås, Svedio. Tel. (+46 21) 41 70 45, <sjoerd@esperanto.se>.* Administra sistemo.

Estrarano: Zsófia KÓRÓDY, *Esperanto-Centro, Grubenhagenstr. 6, DE-37412 Herzberg/Harz, Germanio. Tel./fakso (+49) 5521-5983, <zsofia.korody@esperanto.de>.* E-centroj, instrukapabligado.

Estrarano: Aida ČIŽIKAITĖ, *Kapinių 11-15, LT-50189 Kaunas, Litovio. Tel. (+370) 37 793408. <aidute@mail.lt>.* Konferencoj. Scienca agado.

Estrarano: Mihai TRIFOI, *Str. Principala Bl.1 Ap.3, RO-527116 Bixad/Jud. Covasna, Rumanio. Tel.(+40)267-365319, <trifoi@honoris.ro>.* Lerneja agado.

Estrarano: Yas KAWAMURA, *13-8 Nakayata-cho Babanomizo Kameoka-si, Kyoto-fu, JP-621-0855, Japanio. <esperanto@d0y0b.com>.* Azia agado.

Titolpaĝe: Preĝejo de Sankta Maria en Krakovo (foto de Sjoerd BOSGA).
La nunan numeron ni sendis al la presejo 22 novembro 2008, redaktofino por la sekva numero 15 januaro 2009.

Scienca Komitato

***Prezidanto*: Humphrey Tonkin**, Usono, University of Hartford; AdE[1]
***Vicprezidanto*: Detlev Blanke**, Germanio, Prezidanto de la Societo pri Interlingvistiko
***Membroj*:**
Vera Barandovská-Frank, Germanio, Universität Paderborn; AIS[2] San Marino
Duncan Charters, Usono, Principia College, Elsah
Renato Corsetti, Italio, Università degli Studi di Roma „La Sapienza"; AdE[1]
Probal Dasgupta, Barato, LRU, Indian Statistical Institute, Kolkata; AdE[1]
Michel Duc Goninaz, Francio, Université de Provence; AdE[1]
Aloyzas Gudavičius, Litovio, Šiaulių universitetas
Wim Jansen, Nederlando, Universiteit van Amsterdam
Boris Kolker, Usono; AdE[1]
Ilona Koutny, Pollando/Hungario, Uniwersytet im. Adama Mickiewicza w Poznaniu; AdE[1]
Mauro La Torre, Italio, Università degli Studi Roma Tre
Maria Majerczak, Pollando, Uniwersytet Jagielloński w Krakowie
Geraldo Mattos, Brazilo, Federacia Universitato de Paranao; AdE[1]
Aleksandr Melnikov, Rusio, Академия Сельскохозяйственного Машиностроения
Radojica Petrović, Serbio, Univerzitet u Kragujevcu
Balázs Wacha, Hungario, MTA Nyelvtudományi Intézet
***Sekretario:* Aida Čižikaitė**, Litovio; estrarano de ILEI

[1] AdE – Akademio de Esperanto
[2] AIS – Akademio de la Sciencoj, San Marino

Enkonduko



Titolpaĝe Vi jam eksciis, ke la ĉefa aranĝo de ILEI en 2009 okazos en Pollando. Sur la lastaj dek paĝoj vi trovos detalajn informojn pri la 42-a Konferenco kaj ankaŭ paperan aliĝilon. (La prokrastitan aperon de tiu ĉi numero kaŭzis ĝuste la atentaj antaŭpreparoj de tiu evento.) Vi povas aliĝi ankaŭ pere de la nun ricevita aliĝilo, sed se vi havas retan aliron, prefere uzu la retan aliĝilon troveblan en la hejmpaĝo de ILEI. Tiel vi faciligos la laboron de la organizantoj.

Eble vi jam ĝoje rimarkis, ke la paĝonombro de la aktuala numero kreskis de 40 al 44. La kreskon ebligis la financa bonfarto de ILEI kaj la decido de la estraro dum la oktobra kunsido en Krakovo. Dum la sekva jaro ni planas plian evoluigon de nia revuo, espereble vi vidos la rezulton.

En la nuna numero vi trovos detalajn raportojn pri pli ol dek gravaj fakaj aranĝoj, kaj aparte abundan materialon pri la instrukapabligaj ebloj. En la sekvaj numeroj ni ŝatus aperigi pli da fakaj, precipe pli da aplikeblaj metodikaj artikoloj. Ni kore invitas ĉiujn pedagogojn kunlabori kun ni.

Jozefo Németh, redaktoro

>> Plu >>

de Radojica PETROVIĆ, *Prezidanto de ILEI*



La 41-a konferenco de ILEI en Portonovo kaj estrarkunsido okazinta fine de oktobro en Krakovo rekonfirmis la programan orientiĝon kaj agadkapablon de ILEI. La fidokrizo kiu skuis ILEI kaj ĝiajn rilatojn kun UEA en la dua kvarono de la jaro lasis domaĝajn spurojn kiuj ankoraŭ daŭras, sed la organizaĵo montriĝis sufiĉe forta por rezisti la dubojn kaj misprezentojn.

La kasistaj, estrara kaj kontrolkomisiona raportoj estis prezentitaj kaj diskutataj dum la publika kunsido de ILEI enkadre de la UK en Roterdamo kaj dum la konferenco en Portonovo. Ili konfirmis, ke la ekonomio de ILEI estas stabila kaj ke la Estraro disponis pri la rimedoj de ILEI kaj gvidis la organizaĵon laŭstatute kaj konforme al ĝiaj agadceloj. La komitatkunsido laŭtradicie okazis dum la konferenco, tamen sen kvorumo ĉi-foje. Tial – konforme al la Statuto, punkto 7.2.7 – la Estraro organizas skriban voĉdonadon de komitatanoj pri la traktitaj demandoj.

Krom la financa bonfarto, ankaŭ la membronombro de ILEI estas stabila dum kelkaj lastaj jaroj kun daŭra kresko en la lastaj monatoj. Sur tia ekonomia kaj organiza fundamento la Estraro plu planas kaj plenumas sian laboron sojle de la 60-jariĝo de ILEI. Kompreneble, la Estraro ne estas la sola nek la ĉefa agadforto de ILEI. La efektiva vivo de ILEI okazas en ĝiaj sekcioj kaj ĉie kie ĝiaj membroj instruas pri kaj per Esperanto.

Por la sekcioj

Tasko de la Estraro estas flegi la organizan agadmedion kaj subteni la agadon en ĉiuj niveloj kaj partoj de la organizaĵo. Estas bezonata pli videbla kunlaboro de la Estraro kun la sekcioj, kaj de la sekcioj inter si. Deklaroj pri faremo kaj subteno ne sufiĉas, sed faroj kaj rimedoj estas bezonataj. Tial la Estraro decidis lanĉi konkurson por projektoj konformaj al la celoj kaj agadbezonoj de ILEI. Ĝi estos publikigita en la retejo kaj tra retlistoj de ILEI.

Instrukapabligado

Post longa tempo, ILEI denove eldonas diplomojn pri instrukapablo, ĉi-foje por lingvopedagogia specialiĝo en la Interlingvistikaj studoj ĉe Universitato Adam Mickiewicz (UAM) en Poznań. Nia tasko kaj intereso de ILEI estas certigi ĉiujaran daŭrigadon de la postdiploma specialiĝo de E-instruistoj en Poznań. La anonco por la jaro 2008/09 venis iom malfrue, sed por 2009/10 kaj plu necesas jam nun komenci la preparojn: informadon kaj varbadon de studentoj kiuj deziras plene kvalifikiĝi por E-instruista laboro. La sekcioj de ILEI havas en tio sian gravan rolon. La programo por formado de E-instruistoj kreita en Poznań utiligeblas ankaŭ en aliaj universitatoj kaj edukcentroj kiuj plenumas la bezonatajn kondiĉojn.

La kunlabora projekto *Flugiloj de malfacila vento* de ILEI kaj E@I fariĝis kaj daŭre estas populara precipe inter junaj esperantistoj kaj instruemuloj. El ĝia sino naskiĝis la tre sukcesinta kaj populara *Manlibro pri Instruado de Esperanto*, komuna verko de 12 aŭtoroj, kies tria papera eldono estas bezonata kaj prespreta.

La seminario *Gvidu la Flugilojn* trejnis novajn gvidantojn de la bazaj seminarioj de *Flugiloj* kaj plifortigis ĝian teamon. La Estraro nun strebas apliki la projekton en aliaj mondopartoj, dum diversaj E-aranĝoj en Azio, Afriko, Ameriko kaj Oceanio. Jam komence de julio 2009 en DR Kongo okazos seminario de *Flugiloj* enkadre de nun planata ILEI-seminario en Kinŝaso.

Eldonado kaj komunikado

La Estraro turnas sian atenton precipe al:

– rekonstruo, plifunkciigo kaj akurata aktualigado de la retpaĝaro de ILEI subtene al la agado de ILEI kaj ĝiaj sekcioj;
– pliampleksigo kaj plibonigo de la aspekto de IPR;
– eldonado de plurlingvaj flugfolioj kaj varbiloj por enmovada kaj ekstermovada uzado;
– certigo de la pluekzisto de *Juna amiko*;
– pliriĉigo de lingvo-pedagogia materialo por internacia uzo.

Por atingi la profesinivelan kvaliton, estos uzataj servoj de kompetentaj programistoj kaj aspektigantoj en la buĝetaj limoj. Abundon da informa kaj didaktika materialo ofertas la retpaĝaro *lernu.net* en pli ol 20

lingvoj. Komuna eldonprojekto de *lernu!*-teamo kaj ILEI antaŭvidas kajerserion de *lernu!*-materialoj uzeblaj ĉie kie *lernu.net* malfacile atingeblas rete, utilaj precipe por tiuj sekcioj kaj landoj en kies lingvoj mankas informa kaj didaktika materialo pri E-o.

Utiligado

Utiligado de E-o por plifaciligo kaj plijustigo de komunikado kaj interŝanĝo de ideoj kaj valoroj estas motivo de ĝia disvastigado. La esenca motivo de la ILEI-agado estas la utiligado de E-o en edukado. Esperanta pedagogio kiel disciplino de esperantologio pli videblas en la praktika pedagogia utiligado de la lingvo ol tra teoriaj traktado kaj ĝeneraligoj de esperantopedagogiaj celoj, esplorproblemoj, metodoj kaj principoj. Tion pruvas la projektoj kiaj estas Interkulturo, AKEL, FRINGOJ, Infanoj ĉirkaŭ la mondo, la plurjardeka agado de *Bona Espero* en Brazilo, E-o en orfejoj kaj rifuĝejoj de Afriko, E-o en universitatoj de Ĉinio ktp. Pluraj propedeŭtikaj eksperimentoj pri E-o indikis kuraĝigajn rezultojn en la pasintaj jardekoj, tamen sen sufiĉe argumentitaj kaj science validigeblaj definitivaj rezultoj. La brita projekto *Springboard to languages* nun survojas al tiu celo per sia lingvokonsciiga kaj lernfaciliga orientiĝo.

ILEI celas subteni kaj pluevoluigi tiajn kaj instigi novajn iniciatojn. Tio estas unu el la celoj de la ĉi-supre menciita konkurso. Inter la prioritataj taskoj estas revivigo de la E-utiliga projekto InterKulturo (IK), kiu en la jaroj 2003-2005 atingis notindajn rezultojn enmovade kaj ekstermovade, kaj poste iom endormiĝis. Rekonstruo de la IK-retportalo, uzado de retkomunikaj faciligoj de *lernu.net* (forumejo, virtuala klasĉambo) kaj paperaj IK-paĝoj de *Juna amiko* estas planataj.

Regiona agado

La ILEI-aranĝoj en Afriko en la jaroj 2007 kaj 2008 malfermis por ILEI tiun agadspacon pli vaste. ILEI multe lernis pri E-movadaj specifaĵoj en Afriko. Afrikaj gekolegoj spertis, ke ILEI estas fidinda partnero por iliaj bezonoj. Novaj komunaj projektoj estas planataj por la jaro 2009, inter kiuj estas ILEI-seminario en Kinŝaso komence de julio. El la stokoj de siaj libroj kaj malnovaj revuoj, kiuj ĉiam aktualas kaj uzeblas kiel didaktika kaj lingva materialo kaj tre bezonatas por instruado de E-o en Afriko, ILEI disponigos certan kvanton kunlabore kun la Afrika Komisiono kaj Afrika Oficejo de UEA.

Por similaj iniciatoj en aliaj mondopartoj ni bezonas kaj petos kunlaboron de tieaj E-organizaĵoj kaj regionaj komisionoj de UEA. La 43-a konferenco de ILEI en Kubo 2010 certe donos impulson al la ILEI-agado en Ameriko.

Malfermiĝo

ILEI estas malfermita kaj ĉiam pli malfermiĝas por kunlaboro celata al disvastigado kaj utiligado de E-o. Temas ne nur pri principa orientiĝo sed ĉefe pri efektivaj paŝoj.

Enmovade ILEI malfermis sin al la TEJO-generacio tra la projektoj *IK* kaj *Flugiloj* kunlabore kun TEJO kaj E@I. Tio certigas daŭran plijuniĝon de ILEI kaj plivastigon de ĝia celgrupo: al bazlernejaj kaj mezlernejaj instruistoj kaj lernantoj, pri kiuj ILEI ĉefe atentas, aldoniĝas universitatanoj kiel grava agadresurso. Konekse kun tiu ĉi tendenco, ILEI strebas al efektivigo de ambaŭflankaj kunlaboriniciatoj kun AIS kaj ISAE. Ankoraŭ ne estas sufiĉa la reciproka malfermiteco inter ILEI kaj regionaj/kontinentaj komisionoj de UEA.

Ekstermovada malfermiĝo de ILEI realiĝas tra:

- dumkonferencaj lingvaj festivaloj altirantaj atenton de la lokaj publiko kaj amaskomunikiloj;
- ĉiujara simpozio pri la konferenca temo kun partopreno de esperantistaj kaj neesperantistaj universitatanoj kaj kulturkreantoj el konferenclando kaj el Esperantujo;
- partopreno de ILEI-anoj en internaciaj fakaj konferencoj;
- pluagado en la Unesko-rondoj malgraŭ la formala ĉeso de operaciaj rilatoj de ILEI kun Unesko;
- membreco en FIPLV;
- kunlaboro de ILEI-sekcioj kun lernejoj kaj instancoj de la eduksistemoj en siaj landoj;
- proponado de subvenciindaj edukprojektoj al ekstermovadaj subvenciantoj.

La ĝisnunaj rezultoj kuraĝigas al pluaj paŝoj. Ĉi-direkta agado meritas apartan atenton en la jaro kiam koincidas la jubileo de ILEI kun la 60-jariĝo de la Universala Deklaracio de la Homaj Rajtoj kaj kun la 150-a datreveno de la naskiĝo de Zamenhof. La 42-a konferenco de ILEI en lia naskiĝlando estas siaspeca omaĝo al la verko kiun Zamenhof donacis al la homaro apoge al la lingvaj kaj kulturaj homaj rajtoj.

Kaj …

En la lastaj 6 jaroj, post la organiza kaj financa krizo kiu kulminis en la jaro 2002, ILEI stabiliĝis kaj proksimiĝas al sia 60-jariĝo kiel la dua plej granda internacia asocio de esperantistoj kaj la plej aktiva inter la fakaj asocioj de UEA. Tio des pli notindas konsiderante, ke ILEI ne havas profesiajn oficistojn, sed la estraranoj, sekciestroj kaj komisiitoj certigas la funkciadon per sia volontula laboro. Ĉiu el ili kontribuas laŭ sia eblo kaj meritas aprezan dankon.

Antaŭ la Elekta komisiono kaj Komitato nun staras la respondeco elekti Estraron por la oficperiodo 2009/2012 kiu scipovos utiligi kaj pluevoluigi la potencialojn de la 60 jaroj da spertoj, de ekonomia bonfarto kaj organiza stabileco de ILEI fronte al defioj kaj bezonoj de la ĉiam pli rapide evoluanta kaj diversiĝanta homaro.

Kun gratuloj por la jubileo, al ĉiuj agantoj kaj subtenantoj de ILEI mi deziras prosperan kaj ĝojan jaron 2009.

Intervjuo kun Ilona Koutny

IPR: *Dum la ĉi-jara UK vi ricevis Grabowski-premion pro via interlingvistika agado. En la anonco vi estis nomita „spirita heredanto de István SZERDAHELYI". Kion tio signifas?*

IK: Nu, temas pri lia influo al mia kariero. Mi studis E-on en la E-fako de ELTE (Universitato Eötvös Loránd), en Budapeŝto ĉe profesoro SZERDAHELYI. Jam studante en la universitato francan filologion kaj matematikon, mi elektis E-on kiel rapide lernebla lingvon. Mi kaptiĝis kaj restis en la fako – danke al la influo de István SZERDAHELYI. Li estis ne nur konscienca kaj zorgema esploristo, fondinto de esperantologiaj studoj, sed ankaŭ ĝisosta instruisto. Li interese prelegis, allogis gestudentojn, envolvis ilin en diversajn projektojn – kiel la eldonaĵoj de la fako, studrondo – kaj sendis ilin al interesaj lokoj. Li trovis por mi nerezisteblan temon por diplomlaboraĵo (*Grandaj matematikistoj kaj la lingva modeligo*), kiu kunligis miajn intereskampojn. Li sendis min al KCE (La Chaux-de-Fonds, Svislando), kie mi staĝis en CDELI (*Esplorcentro pri la internaciaj lingvoj*



en la urba biblioteko) sub la gvido de Claude GACOND. Tiutempe tio estis grandega eblo kaj travivaĵo por studentino. Cetere, estis interese reiri tien ĉi-somere, post 33 jaroj, kaj sperti la nelaciĝantan agadon de la „arkivisto" kiel Claude nomas sin kaj la progreson de la unika kolektaĵo.

IPR: *Vi laboris en ELTE dum jardeko, ĉu ne?*
IK: Post la frua morto de István SZERDAHELYI en 1987 mi dungiĝis kiel lia posteulo en la E-fako. Mi instruis esperantajn lingvon kaj gramatikon, kaj strebis krei similan etoson por la gestudentoj kiel li. En tiu tempo, kun mia kolegino Zsuzsa VARGA-HASZONITS, ni fondis la internacian esperantologian fakon por ebligi ankaŭ al alilandanoj akiri diplomon pri esperantologio – laŭ la modelo de la enlanda koresponda fako. Al la bona funkciado de la studoj kontribuis hungaraj gekolegoj kiel la june forpasinta Zsuzsa BARCSAY, Katalin HORVÁTH, Blazio VAHA, Árpád RÁTKAI, Péter RADOS k.a.

IPR: *Dum la lasta jardeko via nomo estas ligita al la Interlingvistikaj Studoj en Poznań (Pollando)...*
IK: Mia privata vivo kaŭzis neantaŭvideblan turniĝon en mia vivo. Mi daŭrigis mian karieron en la Lingvistika Instituto de UAM (Universitato Adam Mickiewicz), en Poznań (Pollando). Mi eklaboris en la hungara fako, sed la kondiĉoj estis favoraj por fondi postdiploman interlingvistikan fakon. La unuaj gestudentoj komencis siajn 3-jarajn studojn (en ekstera formo) en 1998 kaj la tia grupo estas finanta siajn studojn ĉi-jare (kelkaj ankoraŭ batalas kun la diplomlaboraĵo).

IPR: *Kion ofertas la Interlingvistikaj Studoj por la studemuloj?*
IK: En kelkaj universitatoj okazas E-kursoj (dum 2-4 semestroj), en aliaj kursoj pri interlingvistiko (1-2 semestroj). Plena studprogramo, kiu gvidas la partoprenantojn tra diversaj kursoj ĝis iu diplomo ekzistis ĝis nun en ELTE (fondita en 1966 fare de SZERDAHELYI) kaj en la postdiploma formo en UAM. La specialaĵo de UAM estas la internacia instruistaro kaj studentaro. Pro tio la surlokaj semajnaj sesioj okazas nur unufoje dum la semestro. La Interlingvistikaj Studoj ofertas sisteman studadon – similan al filologioj de aliaj lingvoj – kun bazoj de ĝenerala kaj aplikata lingvistiko (Michael FARRIS). Tio estas grava por povi diskuti kun lingvistoj, analizi E-on en simila kadro kiel etnajn lingvojn. La esperanta lingvistiko enfokusigas problemajn terenojn de E-gramatiko (John WELLS, Ilona KOUTNY, Michel

DUC GONINAZ, Blazio VAHA). La studobjekto interlingvistiko prezentas la problemaron de interlingvoj kaj planlingvojn (Detlev BLANKE, Vera BARANDOVSKA-FRANK, Bradio MORO). Okazas kurso pri movadhistorio kaj la plej aktualaj problemoj de la movado (Aleksander KORĴENKOV, Humphrey TONKIN). Literaturon instruas Lidia LIGĘZA, Tomasz CHMIELIK, István ERTL. Internacia kaj interkultura komunikado havas gravan rolon en la studoj (Ilona KOUTNY, Aleksander MELNIKOV, Zbigniew GALOR).

IPR: *Ĉu tiuj, kiuj instruas aŭ volas instrui E-on povas profiti el tiuj ĉi studoj?*
IK: La unuaj du jaroj de la studoj donas la bazon, kiu necesas por ĉiuj seriozaj instruistoj – same kiel ĉe aliaj lingvoj. En la tria jaro okazas specialiĝo: E-lingvistiko, interlingvistiko, E-literaturo, komunikado kaj lingvopedagogio. Ĉi-lastan gvidas Katalin KOVÁTS, la motoro de *edukado.net,* kaj kontribuas Maria MAJERCZAK el la Jagelona Universitato (Krakovo). Tio certigas la profesian trejnadon de estontaj instruistoj. Tion atestas la ĝis nun finintoj Mónika MOLNÁR, Iwona KOCIĘBA, Alain DELMOTTE, Małgorzata NITKOWSKA kaj Anne JAUSIONS (iliaj diplom-laboraĵoj retroveblas en *edukado.net*).
En la pasinta studjaro ni startigis novan formon por instruistoj – kunlabore kun ILEI: dum unujara studado (entute tri vizitoj en Poznań) eblas fari la lingvopedagogian programon de la Interlingvistikaj Studoj (havi donace parton de la aktuala programo), kaj post kompleksa ekzameno kaj fin-laboraĵo akiri instruistan diplomon de ILEI. Tion akiris en septembro Edit SLEZÁKNÉ TAR el Hungario kaj Jurate BARTASKIENE el Litovio.
Ĉi-jare tamen ne estis sufiĉe da interesiĝantoj... Kie estas tiuj, kiuj volas akiri instruistan diplomon pri E-o?

IPR: *Ankaŭ mi miras. Mi esperas, ke la alvoko ĉi tie eble mobilizos kelkajn. Sed la nova, kvara grupo startis, ĉu ne?*
IK: Jes. Estas malgranda, sed tre entuziasma kaj internacia grupo. [*Vidu la apartan raporton pri tio! – NdlR*] Bedaŭrinde ĉi-foje nek hungaroj, nek poloj partoprenas. Ankaŭ la postuloj de UAM severiĝis, nur tiuj povas komenci la postdiplomajn studojn, kiuj jam havas iun universitatan diplomon. Pasintfoje aliĝis pluraj junuloj sen diplomo uzante la stipendion de ESF (*Esperantic Studies Foundation*).

IPR: *Kiel vi festas la 10-jariĝon de la Interlingvistikaj Studoj?*
IK: Ni organizis interlingvistikan simpozion kun la partopreno de niaj geinstruistoj, iamaj kaj nunaj gestudentoj. Ni alvokis ĉiujn interersiĝantojn pri interlingvistiko kaj esperantologio festi kun ni. Tiel kunvenis 85 personoj el 22 landoj kaj okazis 32 altnivelaj kaj interesaj prelegoj dum la du tagoj, tuj post la septembra sesio. Vidu la programon kun resumoj kaj raporton en la retpaĝoj de la Studoj! Estas tre grave, ke la gvidantoj de UAM kontribuis al la malfermo kun laŭdaj vortoj pri la Studoj, dum la bankedo ili povis interparoli kun la partoprenantoj kaj certiĝi pri la vivplenaj scienca agado kaj interkultura komunikado. Raportis pri la simpozio la loka televido kaj la reta Akademia Forumo.



Iamaj kaj nunaj gestudentoj kaj instruistoj de la Interlingvistikaj Studoj

IPR: *Kiel plu?*
IK: Komenciĝis la nova trijara studado, kie ni provos pli eluzi la retajn eblojn en la instruado. Post 10 jaroj la studmaterialoj maturiĝis, ke ili aperu libroforme. El la planataj 6 volumoj ni eklaboris pri la unuaj du:

1. Komunikado kaj kulturo (red. Ilona KOUTNY); 2. Esperanta literaturo (red. Tomasz CHMIELIK). Ili devos aperi por la sekvajara UK, ĉar ili estos uzeblaj ankaŭ ekster la studoj, entute similaj lernolibroj mankas.Mi daŭrigos la laboron pri la trilingvaj etvortaroj kune kun miaj gestudentoj. Post la 3 volumoj da angla-e-hungaraj etvortaroj [*recenzoj en IPR 03/2 p.31-32, IPR 06/2 p.25-26 – NdlR*] aperis por la ĉi-jara UK la unua germana-e-pola versio de Lingvo kaj komunikado, por la sekva jaro ni planas la germana-e-polan version de Lernado kaj laboro.
En la sekva jaro estus profesoro SZERDAHELYI 85-jara, pretiĝas memorlibro al li [*vd la anoncon en la rubriko „Por via notlibro" – NdlR*].

IPR: *Dankon pro la intervjuo kaj multajn sukcesojn mi deziras al vi por realigi viajn planojn en la nomo de la redakcio kaj legantaro de IPR.*
IK: Dankon, subteno estos bonvena kaj ĉefe partoprenantoj por la sekvajara instruista kurso! Miaflanke, mi volas ĉi tie danki al ĉiuj, kiuj helpis atingi la bonajn rezultojn en la Interlingvistikaj Studoj: al gekolegoj, kiuj altigis la nivelon de la studoj, al gestudentoj, kiuj sindediĉe finfaris la 3 jarojn kaj al ESF pro la financa subteno.

Nova jardeko de Interlingvistikaj Studoj en UAM

de Ilona KOUTNY, gvidanto de la *Interlingvistikaj Studoj*

La nuna septembra sesio de la Interlingvistikaj Studoj (en UAM, Poznań) estis escepta, ja kompletiĝis la unuaj 10 jaroj. La evento estis festata per internacia simpozio pri la *Lingvistikaj kaj kulturaj aspektoj de interlingvistiko* (18-19.09), en kiu partoprenis 85 homoj el 22 landoj (raporto: *http://www.staff.amu.edu.pl/~interl/*). Ĉeestis ankaŭ la gvidantoj de la universitato kaj esprimis sian kontenton.

Parto de la tria grupo plenumis sian finan ekzamenon post 3-jara studado prezentante sian diplomlaboraĵon. Gratulojn al Marc BAVANT (Francio): *La viva genro preter akordo. Interagoj de semantiko kun sintaksa rolmarkado*; Kirilo BROSCH (Germanio): *Vortfarado el la vidpunktoj de la hindeŭropista lingvoscienco kaj de esperantologio*; Anne JAUSIONS (Francio): *La plej oftaj malfacilaĵoj de franclingvaj E-parolantoj*

kaj Horst VOGT (Germanio): *Komunikad-problemoj en la institucioj kaj en la membroŝtatoj de Eŭropa Unio – ĉu teorie kaj politike solveblaj?*

Samtempe ekzameniĝis kaj ricevis instruistan diplomon de ILEI (kadre de la unujara komuna kurso de UAM kaj ILEI, organizita la unuan fojon en la studjaro 2007/08) 3 aliaj partoprenantoj: Jurate BARTASKIENE (Litovio): *Utiligo de poemetoj, rimaĵoj kaj kantoj en la lingvoinstruado*; Witold CZERWINSKI (Pollando): *Pedagogia vortareto Esperanta-pola* kaj Edit SLEZÁKNÉ TAR (Hungario): *Instruado de akuzativo je diversaj niveloj*. La laboraĵoj pri metodiko legeblas en *edukado.net*.

Malgranda, sed entuziasma nova grupo komencis siajn studojn inter la 13-a kaj 17-a de septembro. Alvenis po du partoprenantoj el Brazilo, Irano, Kroatio kaj Usono, po unu el Francio, Grekio, Koreio kaj Ukrainio. Du afrikanoj, bedaŭrinde, ne ricevis polan vizon – ili nur virtuale povas sekvi la unuan semestron. La ĉeestantoj aŭskultis kursojn pri ĝenerala kaj esperanta fonetiko de John WELLS (kun interesaj ekzemploj), pri esperanta kulturo de Aleksander MELNIKOV (kiu ĉerpis ankaŭ el sia nova libro pri vortludoj) kaj Zbigniew GALOR, pri la unua periodo de esperanta literaturo de Lidia LIGĘZA kaj Tomasz CHMIELIK, pri komunikado de Ilona KOUTNY (kie la partoprenantoj nature povis sperti la diferencojn kaj similecojn en la metakomunikado). Pluraj prelegoj de la simpozio kaj de la sekva Arkones (semajnfina kultura renkontiĝo) kompletigis la kursojn.

Vojoj al instruado:

Trejnado de Esperanto-instruistoj, kursgvidantoj

de *Zsófia KÓRÓDY, ILEI-estrarano por instrukapabligo, edukcentroj*

Finiĝis la unua jaro de la nova klerigprogramo, kiu komenciĝis en septembro 2007 post la subskribo de la kunlabor-kontrakto inter *Universitato Adam Mickiewicz* (UAM) kaj ILEI. Tio donas al ni bonan kialon trarigardi, kiuj klerigformoj ekzistas por fariĝi E-instruanto, kursgvidanto.

1. ***3-jara postdiploma studado ĉe UAM**:* Enkadre de la *Interlingvistikaj Studoj* ĉe la universitato en Poznań, Pollando, post dujara baza lernado en la 3-a jaro eblas specialiĝi pri lingvopedagogio por estontaj esperanto-instruistoj. Ĉar temas pri postdiplomaj studoj, studemuloj devas havi jam iun universitatan diplomon. Tiu programo estas la bazo por

instruista trejnado en internacia nivelo. Je la enskribiĝo la lingva nivelo de la kandidatoj atingu B2 laŭ la *Komuna Eŭropa Referenckadro* (KER), je la fino estas testo en nivelo C1. Por ricevi diplomon la partoprenantoj devas pretigi diplomlaboraĵon kaj prezenti provinstruadon.

2. ***1-jara instruista trejnado***: en 2007 la Interlingvistikaj Studoj ĉe UAM kaj ILEI decidis kunlabori en la pluevoluigo de la lingvopedagogia specialiĝo. Tiun komunan programon ILEI akceptas kiel instruistan kurson kaj eldonas internacian instruistan diplomon por tiuj kiuj plenumas la postulojn de la trejnado. Temas pri dufoja partopreno en unusemajna ĉeesta sesio en Poznań (ĝenerale meze de septembro kaj komence de februaro). Tiuj intensaj sesioj (min. 40 h.) disponigas la bazajn konojn necesajn por instruado de E-o kaj trejnas la partoprenantojn pri metodiko. Intertempe necesas hejma laborado, reta konsultiĝo kun la kursgvidantoj kaj pretigo de diplomlaboraĵo pri metodika temo. Post unu jaro okazas la fina ekzameno, kiu postulas krom metodiko bazajn konojn pri la gravaj eventoj de la E-historio, pri la ĉefaj periodoj de la E-literaturo kaj tiklaj punktoj de E-gramatiko.
Kursoj de la trejnprogramo: Bazaj faktoroj de lingvopedagogio, esperanta metodiko, instruhelpiloj, modelleciono. Minikursoj pri literaturo, movadhistorio kaj gramatiko.
Kondiĉoj de partopreno: finita mezgrada lernado (tipo de abiturienta ekzameno), bona lingvoscio, baza kono de E-kulturo.
Ni alvokas ĉiujn, kiuj ŝatus akiri diplomon de ILEI, esti rajtigita kursgvidanto laŭ la instruprogramo de UAM/ILEI: bv. anonci vin al la sekva semestro en septembro 2009.

3. ***Flugiloj-seminarioj***: TEJO kaj ILEI subtenas la klerigadon de junaj instruemuloj, kiuj havas fortan deziron lanĉi kurson de Esperanto, sed bezonas profundigi siajn teoriajn sciojn pri instruado kaj ricevi praktikajn konsilojn kaj sperton. La trejnseminario (8 studunuoj po 1,5 horoj) konsistas el 2 temaj partoj: la metodika kaj la gramatika. La metodika parto enhavas la sekvajn teoriajn temojn: instrumetodoj; bazaj principoj de instruado; planado de leciono; lerniloj. Dum la praktika parto necesas prezenti instruadon de lecion-fragmento. En la gramatika parto estas traktataj malfacilaĵoj de la E-gramatiko.
Flugiloj-seminarioj ĝenerale okazas dum grandaj junularaj kunvenoj. La trejnitoj ricevas atestilon pri partopreno kaj fariĝas membroj de ILEI.

4. ***Studsesioj: Modelo Herzberg***: Nun estas ellaborata sistemo de moduloj por instrukapabligado. Interkultura Centro Herzberg (ICH) jam de pluraj jaroj regule organizas kursojn por klerigado kaj pluklerigado de instruantoj. La bezonata lingvo-nivelo estas B2 ĝis C1 laŭ la Komuna Eŭropa Referenckadro (KER), la enhavo de la moduloj estas en harmonio kun la postularo de la lingvopedagogia kurso de UAM.
En 2009 la Studsesioj ofertos kompleksan lingvan kaj fakan kursaron pri la fakoj: metodiko, literaturo, historio, kulturo, varbado, movadaj konoj ktp.
Estas oferto ankaŭ por staĝantoj, kiuj ŝatus spertiĝi pri esperanto-instruado en lokaj lernejoj kaj lingvokursoj por urbanoj de Herzberg am Harz – la E-urbo. Kontakto: <*zsofia korody@esperanto.de*>.

Konferenco en Amsterdamo

de Aida ČIŽIKAITĖ, ***estrarano de ILEI por konferencoj, scienca agado***

Esperanto, esperantologio aŭ interlingvistiko ankoraŭ ne estas regule instruataj en universitatoj, kaj ili ankoraŭ ne facile eniras la programojn de esplorinstitutoj. Universitatoj celas internacian agnoskon de siaj diplomoj kaj tio ankoraŭ pli malfaciligas la taskon. Tamen klopodoj pli kaj pli multiĝas, la statistikoj montras kreskon de universitatoj en kiuj E-o kaj la temoj al ĝi rilataj estas instruataj kaj esplorataj, eĉ se mankas taŭgaj lernolibroj, bibliotekaj kolektoj k.s.

Sekve, estas urĝa bezono starigi pli rektan kunlaboron kaj reciprokan kunhelpon inter universitatoj kaj institutoj, kie okazas la koncernaj studoj, aŭ kie oni deziras enkonduki ilin

Centro de Esploro kaj Dokumentado pri Mondaj Lingvaj Problemoj (CED) decidis okazigi malgrandan Konferencon pri E-o kaj Interlingvistiko en Universitatoj kaj Esplorinstitutoj, tuj antaŭ la UK de E-o en Roterdamo. La konferenco okazis en la Universitato de Amsterdamo, en kunlaboro kun ESF (*Esperantic Studies Foundation*) kaj la Universitato mem, kaj sub egido de *d-ro Wim JANSEN* de la Lingvistika Fako de la Universitato, docento pri interlingvistiko en la Universitato. Kvindeko da fakuloj el 39 universitatoj kaj esplorinstitutoj en 23 landoj kolektiĝis ĉe la Universitato de Amsterdamo por pridiskuti.

Okazis pluraj plenaj sesioj, sed ĉefe la konferencanoj laboris en grupoj:

(1) *Studprogramoj*. Kiujn elementojn enhavu taŭgaj studprogramoj? Kiuj modeloj jam ekzistas? Kia materialo ekzistas – skribe, rete, aliforme? Kiel ligi la studprogramojn kun aliaj parencaj fakoj?
(2) *Interŝanĝoj kaj kunlaboro*. Kiel utiligi la rimedojn en aliaj universitatoj, inkluzive bibliotekajn kaj instruajn rimedojn? Kiel dividi la proprajn rimedojn kun aliaj universitatoj? Kiel interŝanĝi profesorojn kaj studentojn?
(3) *Starigo de programoj kaj administrado*. Kiel konvinki sian universitaton starigi programon? Kiel kongruigi ĝin kun eksteraj postuloj (ekzemple la Bolonjaj interkonsentoj)? Kiel daŭrigi la programon? Kiel serĉi eksterajn financajn rimedojn?

La enkondukan paroladon faris *John C. WELLS*; respondis al ĝi *Detlev BLANKE* kaj *Probal DAŚGUPTO*. Prelegis en la pleno kaj gvidis la koncernan laborgrupon: *Wim JANSEN* pri studprogramoj, *Sabine FIEDLER* pri starigo de programoj kaj administrado, kaj *Ulrich LINS* pri interŝanĝoj.

Antaŭ la konferenco ĉe *http://www.esperantic.org/achome.htm* estis kolektita utila materialo pri unuopaj programoj, metodoj ktp., tiel ke ĝi estu je la dispono de ĉiuj partoprenantoj (kaj ankaŭ de aliaj interesatoj) kaj do pridiskutebla surloke. Ĉiu estas petata sendi materialon pri la propraj programoj al <*admin@esperantic.org*>. Aparte bonvenaj estas detaloj pri la enhavo aŭ strukturo de kursoj kaj programoj. Ĉe la retpaĝaro troviĝas ankaŭ gazetaraj komunikoj en E-o kaj la angla, kiujn oni povas uzi en loka gazetaro.

En la fina sesio de la konferenco estis ellaboritaj konkludoj. La konferenco estis nur komenco de daŭra kunlaboro kaj interŝanĝo de spertoj. Tiu ĉi konferenco estas aparte interesa por ILEI-rondoj, ĉar interesoj tre similas kaj laborkampo estas la sama. ILEI ja estas partnero de UEA, kiu okupiĝas pri edukado. Laboro en universitatoj estas parto de tiu tereno. Pro tio ne indas apartigi niajn fortojn. Pli bone ni kunvenu ĉiuj en la sama loko kaj en la sama tempo. Ni dividu spertojn kaj laborojn.

Ĝuste pro tio sekva renkontiĝo estas planata post unu jaro en ILEI-Konferenco en Krakovo 17-25 julio 2009. Tie ni esperas daŭrigi la starigitan dialogon, resumi laborojn faritajn dum unu jaro, pritaksi ilin kaj plani sekvajn paŝojn.

“Flugiloj de malfacila vento” dum IJK, Hungario

de Aleksander OSINCEV, ĉefkunordiganto kaj gvidanto



De la 26-a de julio ĝis la 2-a de aŭgusto 2008 kadre de Internacia Junulara Kongreso (IJK) en la urbo Szombathely, tradicie okazis la instru-metodika seminario „Flugiloj de malfacila vento“, kiu estas projekto de ILEI kun subteno de E@I por komencantaj instruistoj de E-o kaj instruemaj e-istoj. La seminarion partoprenis pli ol 15 personoj el diversaj landoj kun diversaj instrusperto kaj aĝo. La gramatika parto de la seminario estis gvidata de *Paŭlo MOĴAJEV* [*vd. lian foton apude*], kiu ekde la komenco de la seminario estis ĝia gramatika gvidanto kaj kunordiganto, kaj kiu jam kungvidis la seminarion dum la IJK en Kovrov kaj Zakopane kaj dum RET-07 en Rusio. La metodikan parton gvidis *Aleksander OSINCEV*, kiu kungvidis la seminaron dum RET-07 kaj ĉefkunordigis du lastajn seminariojn. *Irina GONĈAROVA*, majstrino de la projekto, rolis kiel observanto. La gramatika parto enhavis malfacilaĵojn de E-gramatiko kaj gramatikan ekzercadon. Dum la metodika parto oni pridiskutis diversajn metodojn de lingva instruado, planadon de leciono kaj kurso kaj specifaĵojn de E-instruado. La seminario konsistis el 4 metodikaj kaj 4 gramatikaj poduhoraj programeroj dum 4 tagoj.

Dum la tria tago okazis prezentoj de diversaj E-metodoj fare de spertaj instruistoj de E-o: Zlatko TIŠLJAR (Slovenio), *Paŭlo MOĴAJEV* (Ukrainio), *Irina GONĈAROVA* (Rusio) kaj *Xosé CONDE* (Hispanio). Dum la 4-a tago la partoprenantoj havis eblon mem prezenti siajn 15-minutajn lecionojn. Ĉiujn kondiĉojn de partopreno plenumis 7 personoj (po unu el Nederlando, Ĉeĥio, Germanio, Hungario, Francio kaj du el Rusio), kiuj dum internacia koncerto solene ricevis atestojn kun rekomendo kiel instruistoj de E-o. Ĉiuj partoprenantoj iĝis membroj de ILEI.

Fulmkursoj en Vieno

de Edit SLEZÁKNÉ TAR

Bonegan eblon mi havis por spertiĝi pri instruado, filmante fulmkursojn de d-rino Katalin KOVÁTS en Vieno, komence de oktobro. Ankaŭ la E-muzeo en Vieno aliĝis al la „Longa nokto de muzeoj" (aranĝata jam de 7 jaroj). Tio signifas, ke dum tiu sabato multaj muzeoj plilongigis la malfermajn horojn ĝis la 1-a nokte kaj unu sola enirbileto validis por ĉiuj aliĝintaj muzeoj. Alloga oferto de la E-muzeo (kaj brila varbado por E-o) estis la fulmkursoj, gvidataj jam de multaj jaroj de d-rino Katalin KOVÁTS (HU-NL) aŭ foje de ŝia filino Petra SMIDÉLIUSZ (HU). El la 1485 personoj kiuj vizitis la muzeon (210 partoprenis gvidadon) po 100 kuraĝe partoprenis la 3-3 E-o- kaj klingonajn kursojn. (La muzeo ja havas diversajn librojn, materialojn ankaŭ pri aliaj planlingvoj.)



La intereso estis granda, la salono ĉiam pleniĝis (eĉ montriĝis malgranda). Ĉefe junuloj, studentoj venis al la kursoj, kiuj tre vigle aktivis, ĝuis, ke ili multe komprenas. Dum 45 minutoj ili eĉ sukcese lernis bazajn aferojn en kaj pri E-o. La kursgvidanto ĉiam tre bone adaptiĝis al la grupo,

trovante metodojn, kiel ili povus havi pli grandan sukcesosenton. (Ekz. en unu el la grupoj la lernado de ciferoj montriĝis pli facila – tiam ŝi donis kromajn taskojn, kies sukcesa solvo mirigis la lernantojn!) La bonetosaj lecionoj finiĝis per muziko, ja la grupo formis orkestron, ludante, ke ĝi akompanas la esperantistan kantiston Attila SCHIMMER (AT). Rezulte de lia brila kantado la publiko aplaŭdante, eĉ foje dancante finis la lecionon. Je la peto de la redaktoro de *edukado.net* la unuajn du lecionojn filmis mia edzo (Dr-o Tamás SLEZÁK) kaj mi (Edit SLEZÁKNÉ TAR) (HU). Imaginte nin en la rolo de la partoprenantoj ni konstatis, ke post la informleciono ni tuj komencus serioze lerni E-on, ĉar la instruado estis tiom entuziasmiga kaj inspiriga! La diversajn erojn de la kurso, kun metodikaj klarigoj de la kursgvidinto la interesiĝantoj povas legi en la retejo de Ipernity. Vi trovas la blogejon kaj filmejon ĉe *http://www.ipernity.com/home/edukado.net*

Rondkurso de Vlad'ka CHVÁTALOVÁ en Benino

de François HOUNSOUNOU, <*hounfranc@yahoo.fr*>

Post la ILEI-Konferenco en Benino, la ĉeĥa esperantistino, Vlad'ka CHVÁTALOVÁ, unu el partoprenintoj de la konferenco, decidis gvidi kursojn en Benino en diversaj kluboj. Ŝi korespondadis kun François HOUNSOUNOU pri la organizado de la kurso ne nur en Benino sed ankaŭ en Togolando. La 13an de aŭgusto 2008 François HOUNSOUNOU akceptis Vlad'ka antaŭ la urbodomo de Lokossa. Montrinte al ŝi la afrikan oficejon, kvankam ŝi jam vizitis ĝin kun la grupo de ekskursanoj post la konferenco, ni tie interŝanĝis kelkajn vortojn kun la tiea oficisto. Laŭ la planita programo, ŝi gvidis kurson al la orfoj dum la tuta tago sub la gvidado de François H. Tie ŝi donacis vestaĵojn kaj skribilojn por kuraĝigi la infanojn. Krome skatolo da sapoj estas transdonita al la orfoj kun la sumo de 5000 fcfa en la nomo de grupo da esperantistoj eksterafrikanaj, kiuj vizitis la orfejon. La sekvan tagon, ŝi gvidis kurson en Agamè, la rifuĝejo de la klubanoj de Luc Komlan Lugdotor sub la gvido de Francis AGBENOU. Ŝi instruis al la klubanoj de Pacaj Metiistoj en Lokossa kaj la klubo de Benoit Kodjo Zinkpè kaj la klubo de grupeto da virinoj.

La kluboj Egaleco kaj EJA en Adohoun-Koĝi kaj tiuj en Azové kaj Ayakohoué ricevis kurson de ŝi kun la helpo de Pierre H kaj Latifou

GBADAMASSI. Vizito al esperantistoj (kiuj ne sukcesis ĉeesti la kurson) okazis sub la gvidado de François H en Lokossa.

Entute, Vladka tre bone instruis en Lokossa. Ŝi havas tre bonan impreson pri la klubanoj de pacaj metiistoj en Lokossa. Ŝia instruado havigis al François H aliajn spertojn, kiujn li uzos estonte dum la okazontaj seminarioj. La ĉeesto de Vlad'ka tra kluboj en Benino pliallogis la beninanojn al la movado. Dum la instruado, Vlad'ka kolektis plurajn petojn, kiuj rilatas al lernomaterialoj precipe al vortareto. Nia deziro estas havigi tiajn materialojn al kluboj.



La 19an de aŭgusto, la klubanoj adiaŭis Vladka en la kursejo tuj post la fino de la kurso. Tio okazis en la domo de s-ino Johnson HÉLEINE. Ĉeestis ĉ. 15 e-istoj inkluzive Francis AGBENOU. Dum la tuta restado en Benino, Vlad'ka sentis sin familie pro la etoso kaj la akcepto ĉe diversaj klubanoj en Lokossa. Malfacile la disiĝo okazis inter la esperantistoj post la adiaŭo (la uzado de tiu vorto ne taŭgas al afrikanoj precipe al beninanoj).

La 20an, François HOUNSOUNOU kondukis Vlad'ka al Togolando por daŭrigi la instruadon tie.

Notindas, ke ankaŭ du aliaj esperantistoj vizitis la urbon Lokossa pere de François HOUNSOUNOU. Temas pri Marko MENICHETTI (konatulo de François H en Italio) kaj Jacqueline POUX. Ili respektive restis en Lokossa du tagojn kaj unu semajnon. Pro la premo de la profesia klerigado pri instruado de François H, tiu lasta petis la helpon de Gladstone GAMEFIO gvidi ilin en Lokossa kaj en ĉirkaŭaĵo.

Ĉe la retkafejo, Marko instruis al François kiumaniere alŝuti fotojn al la paĝo kaj Vlad'ka kompletigis la instruadon de Marko pri la maniero retrovi perditajn mesaĝojn en diskutlisto.

Pri finnlandaj lernejoj kaj PISA

de Raita PYHÄLÄ, *magistro, emerita lingvoinstruistino*

La rezultoj de finnaj lernejanoj laŭ PISA[1]-enketado estas bonegaj. El pluraj landoj jam venis vizitantoj por vidi, kiel funkcias la edukado en finnaj lernejoj[2]. Jen kelkaj avantaĝoj de la finnlanda sistemo:

– Preskaŭ ĉiuj finnlandaj instruistoj estas universitate diplomitaj. Ili ne nur bone konas sian fakon sed ankaŭ pedagogion.

– Ĉiuj infanoj havas la samajn eblojn edukiĝi. Apenaŭ ekzistas multekostaj (privataj) lernejoj, kie studu la „elito". Male, ĉiuj 7-15-jaruloj profitas de la deviga senpaga altnivela instruado, knabinoj kaj knaboj kune. Ĉiuj lerniloj estas senpagaj. Uniformon neniu lernejo havas.

– Vizitoj al dentisto kaj kuracisto estas senpagaj, devigaj. Same la veturado al lernejo, se la distanco estas pli ol 3 km-oj. Lerneja varma tagmanĝo estas senpaga. Kuiristoj faras sian eblon por kuiri salubre per la rimedoj donitaj al ili. Multaj lernejoj forigis vendomaŝinojn de bombonoj, dolĉaĵoj kaj nesalubraj manĝetaĵoj kaj trinkaĵoj.

– Ankaŭ 16-18-jaruloj profitas de senpagaj instruado, tagmanĝo, kuracaj servoj; ili pagas nur siajn lernilojn kaj kelkfoje la veturadon al la lernejo.

---

[1] *Programme for International Student Assessment* (programo por internacia takso de lernantoj)

[2] La bonaj rezultoj en PISA logas ĉ. 2000 edukistojn jare por konatiĝi kun la finna lerneja sistemo. Por kontentigi ilin la registaro elektis 17 lernejojn el 80, kiuj sciigis, ke ili ŝatus akcepti vizitantojn.

– En la lernejoj elekteblas tiel nomataj apog-lernantoj, kiuj helpas siajn samlernejanojn, se okazas ĉikanado, maljustaĵo aŭ alia forigenda malbonaĵo aŭ konflikto. Se okazas malfacilaĵoj hejme aŭ lerneje, la lernantoj povas peti helpon de lerneja flegistino kaj kelkloke de lerneja kuratoro, psikologo aŭ alia specialisto. (Pro manko de monrimedoj tio ne ĉiam vere eblas.)
– La finna lingvo estas fonetika kaj ebligas al infanoj rapide lerni legi kaj skribi. Apenaŭ troveblas analfabetoj kaj disleksio. Por infanoj, kiuj havas parolmalfacilaĵojn (plej ofte pro la sonoj *r* kaj *s*) aŭ simptomojn pri disleksio, oni havigas specialistan helpon jam antaŭ la lerneja aĝo.
– Dum la unuaj lernojaroj infanoj ne havas notojn (ĉe ni ciferoj de 4 ĝis 10) en siaj atestiloj, kaj la noto 4, kiu montras kompletan malsukceson, ne trapason, estas preskaŭ nekonata en la deviga lernejo.
– Kvankam la instruado pri fremdaj lingvoj nun jam bedaŭrinde malpliiĝas, infanoj aŭdas fremdajn lingvojn en la televido. Eksterlandaj filmoj havas subtitolojn en la finna, oni ne anstataŭigas la originalajn parolojn per finnaj. Plie, familioj ofte abonas gazetojn kaj tiel oni facile povas legi novaĵojn kaj artikolojn pri la tuta mondo. La lingvaĵo de la gazetoj estas komprenebla al ĉiuj, ĉar la finna lingvo antaŭlonge evoluigis proprajn vortojn anstataŭ prunti fremdajn. (Nun la angla emas nuligi tiun evoluon.)
– En la plejparto de la lernejoj la rilatoj inter la lernantoj kaj geinstruistoj estas amikaj kaj neformalaj. (Lernantoj ciumas plenkreskulojn.) Gruplaboro estas favorata. Leĝo malpermesas korpan punadon; se instruisto atakas lernanton, li/ŝi riskas esti maldungita.

Malgraŭ la supraj avantaĝoj kaj la bonegaj rezultoj en PISA, ne ĉiuj finnaj lernantoj sentas sin kontentaj kaj multajn 16-19-jarulojn atakas deprimiĝo. Kelkaj plendas, ke ili havas tro da hejmtaskoj kaj, ke al ili mankas libertempo. Multaj lernantoj pezas tro multe kaj lernejaj sportohoroj (po 2 ĉiusemajne) ne sufiĉas por la sano. Onidire gefiloj de bone edukitaj familioj pli facile sukcesas ol tiuj de laboristoj kaj terkulturistoj. Ĉiuj scias, ke post la abiturienta ekzameno ne estos facile eniri universitaton aŭ alian studejon kaj, ke post la universitato aŭ metilernejo ne estos facile dungiĝi. Precipe kampare kaj en la Nordo malfacilos trovi laboron en sia naskiĝregiono. Idealan lernejon oni neniam realigos, sed ni atentu kaj estu pretaj por ŝanĝi kaj ŝanĝiĝi.

Ĉinio

Kun la gvido de s-ro WEI Shan funkcias E-kurso en Baiyangshu-strata elementa lernejo en la urbo Taiyuan (Shanxi-provinco). Temas pri la unua elementa lernejo, kiu havas oficialan E-kurson. Ĉ. 120 lernantoj (1-3-klasaj) lernas E-on. La kursanoj volas ekhavi rilatojn kun aliaj lernejoj. Por ricevi kontaktadresojn skribu al LEE Jung-kee: <*esperanto@saluton.net*>.

Germanio

Klerigado de instruistoj en nova formo

Komence de oktobro AGEI, Landa Sekcio de ILEI kun Germana E-Centro/Interkultura Centro Herzberg jam la 4-an fojon organizis renkontiĝon por E-instruantoj kaj instruontoj. Temas pri faka klerigado, pluklerigado, spertinterŝanĝo de spertaj kaj malpli spertaj gekolegoj, interesiĝantoj pri E-instruado. La specialaĵo de la nuna Torpedo estis nova eksperimento: paralele okazigi lingvokurson por komencantoj kaj metodikan seminarion por instruemuloj. Zlatko TIŠLJAR gvidis plursesian tritagan kurson kaj demonstris la Zagreban metodon per observataj lecionoj kun aŭtentikaj komencantoj el Herzberg kaj la sud-Harza regiono. La observantoj povis ricevi de sperta fakulo el unua mano la teknikon gvidi kurson por komencantoj kaj povis analizi, priparoli la observitan lecionon kun la kursgvidanto, diskuti, konsenti aŭ malkonsenti.

Kaj la lingvokurso kaj aliaj eventoj de Torpedo estis filmitaj, ili aldoniĝos al aliaj metodikaj filmoj, fakprelegoj, registritaj lernejaj kursoj, kaj certe bone servos la pluklerigadon de estontaj partoprenantoj.

Jen mallonga raporto de Stefan MACGILL:

Se oktobreko ekis, torpeda sezon' esta'. Efektive, okazis Torpedo-4 en la E-urbo Herzberg, por arigi instruistojn germanajn kaj alilandajn. En la tritaga programo oni gvidis plursesiajn kursojn

– Zlatko TIŠLJAR, kiu demonstris la Zagreban metodon per observataj lecionoj kun aŭtentikaj komencantoj (nun –intoj!) varbitaj el la sud-Harza regiono por la okazo,

– Stefan MACGILL pri rolludado (kun elstaraj realigoj de du rolludoj verkitaj kaj organizitaj de la kursanoj mem),

– Sabine TRENNER pri la Cseh-metodo kaj la organizado de kursoj kaj ludoj sen lernolibro, kaj
– d-ro Rudolf FISCHER, kiu gvidis pritaksan sesion pri la konformeco de germanaj lernolibroj al la postuloj de la novaj Eŭropaj ekzamenaj normoj (Komuna Eŭropa Referenckadro – KER).
Pliajn unuopajn erojn prizorgis:
– Claude TRESORIER (kunlaboro inter E-centroj)
– Petro ZILVAR (movadaj informoj, evoluoj en la Esperanto-urbo) kaj
– Zsófia KÓRÓDY (lernejaj projektoj: instruado en bazlernejoj, mezlernejoj, Comenius-projekto kun Springboard-eksperimento)

La partoprenintoj ĝuis gvidatan viziton al la urba kastelo kun traduko al Esperanto, des pli aprezata de partoprenintoj el Germanio, Pollando, Italio, Nederlando, Korea Respubliko, Kroatio kaj Hungario.
Atento nun turniĝas al preparoj por la unua (kvin-jara) jubilea Torpedo, okazonta en sekva oktobro, kvin monatojn post la Germana kaj Eŭropa Kongresoj, kiuj kombinite okazos en Herzberg en Pentekosto, 2009.
(*http://gek-eek.esperanto-urbo.de*)
Se vi nun maltrafis tiun klerigeblon, bv. atenti: en 2008 kaj 2009 sekvos denove serio de trejnkursoj, studsesioj en Herzberg, Germanio. Kune kun fakprelegoj kaj seminarioj pri literaturo, historio, movadaj konoj, varbado-informado, la kursanoj ricevas abundan materialon por fariĝi vera fakulo. Inter 12-14 de decembro okazos la sekva studsesio. Temos pri la novaj KER-ekzamenoj kaj ĉefe pri literaturo (Lena KARPUNINA, Gerd BUSSING, Peter ZILVAR) kun speciala kultura programo dum la tradicia Zamenhof-festo. Bonvenon!

Zsófia KÓRÓDY
prezidanto de AGEI, Landa Sekcio de ILEI

Hungario

En la urbo Miskolc, en la bazlernejo Komlóstetői s-ino Ilona FEDOR instruas E-on jam ekde pli ol dudek jaroj. En tiu ĉi lernojaro ŝi havas entute 30 gelernantojn, 6 dekdu-jarajn, 14 ok-jarajn kaj 10 naŭ-jarajn. Ili gajnis subtenon en la Comenius-projekto pri "Kunlaboro inter lernejoj", kio signifas, ke ili kunlaboros kun angla elementa lernejo de Bar Hill (apud Cambridge) kaj la germana bazlernejo „Nicolai" en Herzberg. La ĉefa temo de tiu dujara projekto estas E-o. Ili uzas komunan lernmaterialon, kiun prilaboris la anglaj kolegoj kadre de „Springboard" („Saltotabulo al

lingvoj”). Estas planitaj tri vizitoj en la projekto: Unue, en aprilo 2009 ili vizitos la anglan partneron kune kun la germanoj, en oktobro de 2009 ili renkontiĝos en Miskolc kaj poste ili veturos al Germanio.



Italio

La 2-an de oktobro 2008 en Florenco estis organizita kunveno de ANILS (Nacia Asocio de Instruistoj pri Fremdaj Lingvoj) pri la temo: *La tergloba socio, kiel forĝi la lingvoinstruistojn por postsekvi la tempojn*. Dum la kunveno prelegis ankaŭ *Leonardo PAMPALONI* (instruisto de bazlernejo en Prato) sub la titolo: *E-o, lingvo por la tergloba socio*. Li parolis pri lingva demokratio, pri E-kurso por ĝisdatigi la instruistojn, fine pri tri aktualaĵoj: la oficiala prezentado de la Nacia Biblioteko de E-o en Massa (la 25-an de oktobro), la kunveno pri Internacia Jaro de la Lingvoj en Florenco (la 25-an de novembro) kaj la lerneja projekto pri fremdaj vortoj en la itala lingvo, planita de la asocio “*Allarme lingua*” (Alarmo por lingvoj), aprobita de UNESKO kaj subtenata de la itala sekcio de ILEI.

Gratulojn al li! – NdlR

Ukrainio

“Interagado de etnaj kaj planitaj lingvoj en la kunteksto de la eŭropa integriĝo” estis la temo de internacia scienca konferenco, kiu okazis 10-12 de aprilo 2008 en la Volinia nacia universitato Lesja Ukrainka kaj ĝi estis dediĉita al la Internacia Jaro de Lingvoj 2008. […] La unuan fojon en Ukrainio en universitata scienca konferenco je internacia nivelo funkciis speciala sekcio, dediĉita al E-o, kies laborlingvo estis E-o. La sekcion gvidis O. KERZIOUK, sekretariis T. POPOVA. Komence la ĉeestantoj rememoris la forpasintan C. PIRON kaj prezentis lian intervjuon „Kaj vi? Kion vi opinias pri la lingvoj en Eŭropo?”, kiun li sendis por la konferenco. Krome, estis prezentita la prelego de R. CORSETTI „Nova modelo por instrui fremdajn lingvojn al junaj eŭropaj lernantoj: la modelo „Format” kaj ĝia enhavo”. Elpaŝis N. DANILJUK pri la vorto Esperanto kaj aliaj derivitaj vortoj en la ukrainaj vortaroj, S. POGORELAJA kaj A. SHLAĤOVA pri metodikaj aspektoj de E-instruado, N. VOLOŜIN pri novaj eldonaĵoj de ukraina literaturo en E-tradukoj. Krome, ĉeestis esperantistoj M. JASKOT, E. KOVTONJUK, V. TARANJUK, I. HALAJĈUK.

La partoprenantoj akceptis rezolucion, en kiu oni substrekis la gravecon kaj altan nivelon de la prelegoj pri E-o, neceson de specialaj sciencaj esploroj pri la E-movado, lingvaj kvalitoj de E-o, ĝiaj eblecoj kiel laborlingvo dum internaciaj konferencoj.



Oni proponis uzi la resumojn de la artikoloj en E-o.

Ĉiuj ĝustatempe senditaj artikoloj aperis en la speciala numero de la scienca revuo de la Volinia nacia universitato, plene dediĉita al la konferenco en la ukraina, la rusa, la itala lingvoj kaj E-o kun la resumoj en la angla. […]

Nina DANILJUK,
docento de Volinia nacia universitato, sekciestro de ILEI-UA

Vjetnamio

Laŭ interkonsento inter Vjetnama E-Asocio kaj s-ro *Przemek GRYBOWSKI* (mallonge kaj esperante Pŝemo), instruisto ĉe Pedagogia Universitato en Bydgoszcz, Pollando, okazis somera E-kursaro. Pŝemo akceptis instrui senpage. La nombro de partoprenantoj atingis 59. La totala nombro de kunvenoj estis 26. La kursaro okazis ĉe 4 malsamaj lokoj por diversnivelaj kaj diversaĝaj (de 11- ĝis 80-jaraj) kursanoj. Neniam kursaro en Vjetnamio allogis tiom multe da lernantoj, okazis en tiom da lokoj, kun tiom da malsamaj niveloj kaj aĝgrupoj. Jen vere imitinda ekzemplo!

informis: Renato CORSETTI, <renato.corsetti@esperanto. org>

Ĉu defetismo, aŭ io alia?

Reago de Johano PETIK (Hungario)

La artikolo de *Georges-Henri CLOPEAU* en la n-ro 2008/1 (p. 15-18) kaŭzis kelke da surprizo, eĉ konsterniĝo al mi, konsciigante, ke defetismo (aŭ alia io movade malarma) hegemoniiĝis ne nur en la praktika, ĉiutaga „vivo" de E-ujo, sed eĉ en la strategia konceptado de niaj s-anoj emaj okupiĝi pri tiaĵoj. S-ano CLOPEAU ŝajnas voli ne malpli, ol lesivi, redukti nian tradician celaron, atribuante al E-o la solan, nuran destinon esti objekto de lerneja instruado (surbaze de ĝiaj propedeŭtikaj avantaĝoj), fine de ĉio tio, ke kiel tia, ĝi servu ekskluzive por la instruado de etnaj lingvoj fremdaj. La aŭtoro ŝajnas forgesinta tiajn „bagatelajn" celojn, kiel „E-o fariĝu la helplingvo de la mondo aŭ almenaŭ de tiaj ŝtataroj, kia estas Eŭropa Unio (aŭ almenaŭ unu el tiuj lingvoj)", aŭ „ĝi servu kiel rimedo kontraŭ lingva ŝovinismo, aŭ privilegioj sur lingvaj bazoj", se ne paroli pri avantaĝoj ligitaj al la „interna ideo". Ĉu li tion ne scias, ke nia lingvo fariĝas pli kaj pli riĉa je fakterminoj sur pli kaj pli multe da terenoj de sciencoj kaj de la praktika, ĉiutaga vivo kaj tiel pli kaj pli konkuriva ano de la familio de lingvoj?

La propedeŭtikaj valoroj kaj la rolo de E-o en la gardado de „malgrandaj" lingvoj, kontraŭ eklipsiĝo, pereo, de lingva bunteco de EU aŭ de la mondo ne forestis ankaŭ en la tradicia celaro de nia movado, sed tie ili ludis rolon nur sekundaran. Emfazante nur tiujn sekundarajn celojn s-ano CLOPEAU sugestas, kvazaŭ E-o estas maltaŭga je pliaj funkcioj, ol kiom de „propedeŭtikaj lingvoj" (tia rigardeblis iam la latina) estas atendebla.

La menciado de la propedeŭtika valoro de E-o komence de la artikolo anticipigis multe pli ol kiom disvolviĝis en la ceteraj. La ĝenerala instruigo de E-o en lernejoj kiel la unua fremda lingvo prezentus kvazaŭ saltotabulon (aldone nemalhaveblan) por la sekvantaj ŝtupoj de niaj klopodoj kun la fina celo igi E-on la internacia helplingvo (komence de EU, poste de la tuta homaro). Tiu atingaĵo havus nekompareblan gravecon en la disvolvo de nia afero, por kiu persiste lukti estas unu el niaj plej gravaj taskoj. Tiu ĉi tasko estas ne ordinara, nek facila. S-ano CLOPEAU tamen, anstataŭ skizi, kiel atingi ĝin aŭ kion fari post tiu atingaĵo, kontentiĝas je ĝi.

Nia s-ano ne dorlotas nin per klarigoj, argumentoj aŭ ekskuzoj pri la kaŭzoj de siaj iom (se milde paroli) defetismaj ideoj. Tiel en mi luktis 2 klarigoj inter si pri la kaŭzo. La unua estas, ke ankaŭ li (ano de nacio kaj lingvo kun granda „potenco") volas tion saman, kion li mem en la artikolo esprimis jene: „Tiel, la plej potencaj ŝtatoj de Eŭropo esperas savi sian propran lingvon." La dua estas, ke li, verŝajne spertoriĉa e-isto, bone konas nian movadon. Li do bone scias ankaŭ, ke ĉio, kion li aŭ aliaj diras pri nia celoj k.s., estas nura babilado, ĉar niaj movadanoj estas plie aro da individuoj, obstine kroĉiĝantaj al persona libereco, ol tiu da personoj, emaj subordigi sian volon al la volo de la kolektivo, pro kio oni povas nenion gravan atendi de tiu „kolektivo". La demando estas nur, ĉu ni paciĝu kun ĉi tiu defetismo (aŭ insida kontraŭ-E-ismo).

***

Nia kolektivo produktadas neortodoksajn lingvaĵojn, kiuj ne ĉiam obeas la minimuman normon necesan por meriti la kvalifikon "internacie bona", sed tamen evidente varbas adeptojn. Mikspoto el ili sekvas kun korekto-proponoj:

Misfrazoj

rubriko de Rob MOERBEEK (Nederlando)

1. Reveninte hejme, frapis nin, ke mankis la horloĝegon.
2. Li pensis, ke siaj kobajoj manĝis tro da ĝiaj branoj.
3. Ĉu ne estis riska kiam ni verkas pli, ke unu eraroj po unu frazon?
4. Kion ajn li asertu esti, li ne devu konduti sin tiom fremda.
5. Post tri jara geedziĝo ili komenciĝis sin enui manĝinte ĉiam la sama menueto.

6. Sur la departamento de fiskalaj aferoj ne tro efektive laboris rifuĝantoj el Norvego kaj aliaj Eŭropeanoj kiel ukrainanojn, turkmenistananojn ktp.
7. La venontan tago, post pli ol 20 horojn ni devis iri por preni novajn personecaj identiloj.
8. Pluvo kaj vento rezultis en malsanon.
9. Ne la una fojo estis ŝi forgesinte ŝiaj gantoj de arto silko.
10. Sufiĉas la erarojn, ni ĉesu laboro por nia amuzemento.
11. Ĉar ni ĵus atingis la fin'.

Solvoproponoj:
1: Kiam ni revenis hejmen, frapis ni(an atento)n, ke mankas la horloĝo.
2. Li supozis, ke liaj kobajoj manĝas tro el siaj branoj.
3. Ĉu ne estas/estus riske, se ni skribas/us pli ol po unu eraron en frazo? Aŭ: pli ol unu eraron en ĉiu frazo?
4. Kio ajn li estas, laŭ sia aserto, li ne kondutu tiel (tiom) strange.
5. Post tri-jara geedzeco ili komencis enui, manĝante ĉiam la saman menu(aĉ)on.
6. En la departemento de fiskaj aferoj ne tre efike laboris rifuĝintoj el Norvegio, aliaj eŭropanoj kiel ukrainoj, kaj turkmenoj.
7. La sekv(int)an (aŭ: postan) tagon, post pli ol 20 horoj, ni devis irpreni (aŭ veni preni) novajn identigilojn.
8. Pluvo kaj vento rezultigis malsanon. Aŭ: El pluvo kaj vento rezultis malsano.
9. Ne la unuan fojon ŝi forgesis (estis forgesinta) siajn gantojn el arta (sinteza) silko.
10. Sufiĉas la eraroj, ni ĉesu labori (ĉesigu la laboron) por nia amuzo.
11. Ĉar ni ĵus atingis (ĝuste nun atingas) la finon.

Por via notlibro

Alvoko por kontribui al la SZERDAHELYI-memorlibro

La 85-jara datreveno de la naskiĝo de István SZERDAHELYI okazos en 2009. Estas planata memorlibro, al kiu ĉiuj liaj gestudentoj kaj gekolegoj en vasta senco estas bonvenaj kontribui per artikolo aŭ rememoroj. La celo estas prezenti la ĉeeston de liaj ideoj, lian influon inter siaj gestudentoj,

gekolegoj aŭ simple esprimi la estimon, kiun ni havas por lia grandega laboro en la tereno de esperantologio kaj interlingvistiko. Bv kontakti la redaktanton: Ilona KOUTNY, <*ikoutny@amu.edu.pl*>.

Juna amiko kaj OKR[3] en Vilno

Fine de majo 2008 ILEI reprezentiĝis en la multe raportita konferenco de E-ĵurnalistoj de Vilno. En unu prezentaĵo la JA-redaktoro *Stefan MACGILL* skizis la sorton de presitaj revuoj en komputika aĝo, en kiu ĉiam pli da personoj ĉerpas siajn legaĵojn kaj amuzon el la reto. Alia kontribuaĵo okazis per lumbilda prezento de la revuo, pri ĝiaj historio, aspekto, principoj kaj estontaj planoj (legu aliloke!). La konferencaj kondiĉoj estis aparte favoraj, kaj inkluzivis eldonadon de ĉiutaga kolore presita bulteno *La fera lupo*. La ILEI-reprezentanto, portante alian ĉapelon, informis per tiu bulteno pri novaĵo en la programo OmniPage, kiu delonge plenumas optikan karaktro-rekonon por E-o, sed nun unuafoje (ekde versio 16.1) kun la subteno de Esperanta vortaro disponigita de s-ro Toon WITKAM el Nederlando. Kiu posedas OmniPage (version 14 aŭ pli) povas peti senpage la vortaran dosieron de <*stefan.macgill@nuance.com*>.

Pro la konferenco relanĉiĝis la ĵurnalista faka asocio TEĴA. Konsiderante la tri prioritatojn de UEA – informado, edukado, uzado, estas celinde, ke TEĴA plenumu signifan parton de la informa kampo ĉe UEA, ILEI (re)prenu tiun rolon por edukado, dum por akceli la uzadon ĉiu faka asocio havas respondecon. *SMG*

Juna amiko en 2009 – ŝanĝoj kaj senŝanĝoj!

Unue la senŝanĝo, ĉar tie kuŝas bona novaĵo. La estraro de ILEI kuraĝe decidis ne altigi la tarifojn ankoraŭ unu jaron. Do, vi pagos same, la revuo same aperos trifoje jare, kun 52 paĝoj ĉiunumere. La retpaĝo ĉe <lernu.net> restas, kaj daŭre kreskas.

Do en kio kuŝas la ŝanĝo, kaj ĉu tio heroldas nebonan novaĵon? Kontraŭe, ni fidas ke la ŝanĝo portas bonaĵon. Ĝi koncernas ĉefe la enhavon de la komencaj paĝoj de la revuo. La aludita decido konservi la tarifojn estas kuraĝa, ĉar la revuo en la lastaj du jaroj eniris deficiton. Por doni al ĝi sekuran estontecon ni devos altigi la legantaron de la nuna 550

[3] optika karaktro-rekono

ĝis 700, por kio potencialo certe ekzistas. Necesas ĉefe pli da varbaj kaj prizorgaj fortoj, duarange necesas repripensi la enhavon – niaj fidelaj legantoj laŭ niaj esploroj kaj supozoj estas kontentaj, sed ni devas strebi kontentigi novajn legantojn; tiujn kiujn ni *volus* atingi, konvinki kaj konstantigi en nia rondo. Ĉefe temas pri novaj lernantoj, el kiuj multaj trovas la lingvon en la reto kaj ne havas multajn vivajn kontaktojn kun parolantoj. La nunaj legantoj supozeble trafoliumas la tutan revuon ĉar ili jam havas tiun kutimon, kaj trovos aferojn kiuj plaĉas. Novaj potencialaj legantoj foliumos kun malpli da sindediĉo – ofte ili juĝos la revuon pere de la unuaj kelkaj paĝoj. Sekve tiuj paĝoj devas havi la plej universalan allogon, ankaŭ por junuloj kaj komencantoj, kiuj havas minimumajn aŭ nulajn sciojn aŭ intereson pri la movado, ĝia historio, literaturo kaj organizaĵoj. Por ili Esperanto estas precipe nova – espereble fascina – lingvo, kies eblojn kaj lerneblon ili volas eltesti. Espereble, se restas ilia scivolemo kaj provemo, ili iam maturiĝos ĝis la stadio, ke ZAMENHOF, BAGHY kaj centjariĝo de UEA kaj similaĵoj ekinteresos ilin. *Juna amiko*, kiel niaj aliaj lerniloj, ja havas validan taskon prezenti tiajn temojn – en kiel eble plej digestebla formo. Sed plenigo de komencaj paĝoj per tiaj temoj portas riskon fortimigi potencialajn legantojn, kiujn ni bezonas por vivtenigi nian revuon. Do, la sekvaj principoj regos la enhavon de la komenca deko da paĝoj:

- La eroj estu mallongaj kaj de ĝenerala intereso al legantoj ĉiuaĝaj.
- Ili aperu en moderna litertipo kun grandaj literoj, kun abunda ilustrado.
- La vort-trezoro restu kiel eble plej ene de la 1500-radika bazo de la revuo.
- La eroj invitu al partopreno kaj aktivigo de la legantoj.

Tiuj paĝoj inkluzivos novstilan enkondukon kaj enhav-tabelon. Post tiu deko da ‘universalaj’ paĝoj, sekvos la rubriko por etuloj 6- ĝis 10-jaraj (LUME), poste tiu por la 11- ĝis 14-aĝaj (LUDE, kiun plue redaktos Mónika MOLNÁR), kaj la rubriko LASTE (por homoj ajnaĝaj) kompletigos la revuon. La redakcia teamo restos sama, sed ekde nun la du redaktoroj ekdividos la paĝojn egalece: Stefan prizorgos paĝojn 3 ĝis 27 kaj Géza de 28 ĝis 50, plus la kovrilojn. Sekve la pli movadaj eroj (literaturo, historio, argumentado por la lingvo, verdaj paĝoj ks.) aperos en la dua parto de la revuo. Vi povos legi pli da detaloj pri niaj planoj en niaj retpaĝoj: (en la biblioteko de lernu.net, ĉe <*www.junaamiko.inf.hu*> aŭ ĉe Ipernity

http://www.ipernity.com/home/47248. Ni bonvenigas viajn reagojn pri la planoj, kaj poste pri ilia realigo.

La revuo urĝe bezonas vian subtenon. Bonvolu aboni ĝin frue por 2009 kaj instigu aliajn: precipe, bonvolu zorgi ke en via lando ĉiu E-familio mendu ĝin, kaj ke grup-gvidantoj, klubestroj aŭ instruistoj kun E-klaso prenu grupan abonon, por kiu ni donas signifan rabaton! Perantoj en trideko da landoj akceptos viajn abonojn, aŭ anoncu vin al la kasisto de ILEI aŭ al <*stefan.macgill@gmail.com*>.

	1 ekz.	**Ekde 3**
Tarifo 1	€ 14	po € 11
Tarifo 2	€ 9	po € 7

Libroj de ILEI kun rabato de 10% ĝis Zamenhof-tago

La libroservo de ILEI proponas la sekvajn verkojn. Pro la senduba jarfina afranko-altigo, kaj la eblo sendi librojn pli avantaĝe kun la tria numero de Juna amiko, ni anoncas rabaton de 10% je ĉiuj mendoj ricevitaj ĝis 15 decembro 2008. Sube aperas la senrabataj prezoj. Mendu rete ĉe <*stefan.macgill@gmail.com*>. Ni kunsendos fakturon kun plenaj pag-informoj: al la ILEI-Kasisto aŭ la ILEI-konto ilek-a ĉe UEA.

***Okulo*:** Ilustrita lernileto kiu per 40 paĝoj prezentas la komencon de Esperanto al infanoj inter 6- kaj 10-jaraĝaj. Multaj dialogoj gvidas al rapida parol-kapablo – pli ol 40 verboj en klaraj, praktikaj kuntekstoj. € 4,50.

***Okulo – Gvidilo*:** Helpilo por instruistoj uzantaj la supran libron. Resumo pri ĉiu paĝo: enkondukendaj vortoj, modelaj frazoj, gramatikaĵo, komunika kapablo, konsiloj por uzo. Plie ĝi prezentas fotokopieblajn tasko-foliojn. € 4,50.

***Tendaraj tagoj 2*:** Konvena daŭrigo post Okulo. Liveras instigan cel-lingvan lernilon por post-komencanta kurso. Tendaranoj kantas, kanotas, vizitas besto-ĝardenon, sportas kaj verkas mirindan rakonton pri la E-spiono 005. Librofine aperas rolludo kaj kunlaboriga ludo bazita sur 005, lia kamelo kaj Volapukastelo. € 6,90.

***Tendaraj tagoj 3*:** Lernilo por progresiga kurso, konvena por ĉiuaĝaj studantoj. Detala resumo pri –ig- kaj –iĝ- kaj participoj. Praktike kovras ĉiun gramatikaĵon necesan por regi E-on. Pli da aventuroj kun la tendaranoj kaj kun la spiono 005. € 6,90.

***Fantaziaĵoj kaj kantoj por infanoj*:** Verko de la karmemora Jon Rømmesmo el Norvegio. Kun ilustraĵoj kaj muziknotoj por multaj el la eroj. 98 grandformataj paĝoj. € 3,60.

La prezoj ĉe ILEI inkluzivas la sendokostojn. Triona rabato ekde 3 ekz. de ajnaj supraj verkoj, aldone al la 10%. La verkoj estas ankaŭ mendeblaj iam ajn de la libroservo de UEA, sen tiu dumtempa rabato, laŭ ties kondiĉoj (sendokostoj pluse pagendaj, triona rabato valida nur ĉe unuopa verko).

Estrarkunsido en Krakovo

La Estraro de ILEI kunvenis en la urbo Krakovo (Pollando) inter la 23-a kaj la 26-a de oktobro 2008. La okazigo de kunsido tie celis, interalie, la konatiĝon kun la lokaj organizantoj de la sekvajara ILEI-Konferenco, finesploradon pri la kondiĉoj por loĝado, kunvenoj, ekskursoj ktp. Surbaze de tiaj informoj estis finkompilitaj la 1-a informilo kaj aliĝilo por la sekvajara konferenco.

Grava parto de la restado de la Estraro celis ankaŭ la traktadon de administraj kaj organizaj aspektoj de la organizo. Konstatinte la ekonomian bonfarton kaj stabilan staton de ILEI, la Estraro adoptis diversajn decidojn. Unu el ili estis la akcepto de Kubo kiel lando, kie efektiviĝu la Konferenco en la jaro 2010. Plie, la Estraro traktis diversajn temojn, kiel la sekvojn de la Konferenco en Portonovo. Kiel daŭrigo de la laboro de ILEI en Afriko, kune kun la respondeculoj de la Afrika Komisiono estas nun planata la okazigo de trejnseminario en Kinshasa en la jaro 2009. ILEI disponigos lernolibrojn el propra eldono al E-grupoj en afrikaj landoj. La estraro lanĉos perpoŝtan voĉdonadon de la komitato, ĉar la ĉi-jaraj kunsidoj de la komitato en Benino ne estis kvorumaj kaj, sekve, ne decidorajtaj. Plurfoje estis mencioj al la kunlaborebloj kun *lernu.net*, kio kristaliĝos en la formo de diversaj projektoj en la daŭro de la sekvaj monatoj.

Estis priparolo kun la UEA-reprezentanto pri la ebloj akordigi kaj komplementigi la temojn de la ILEI-Konferenco kaj de la Universala Kongreso ekde la venonta jaro. Kun la TEJO-Observanto estis traktita plano por la plua okazigo de seminarioj de ‘Flugiloj de Malfacila Vento’ kadre de TEJO-aranĝoj kaj pri tio plue zorgos Radojica PETROVIĆ kaj Sjoerd BOSGA kaj tiusencan kunlaboron ili kunordigos. Estis aprobita la



lanĉo de oferto de la ILEI-Libroservo, pri kiu vi jam legis en la nuna numero.

Surfote: *S-ro Stanisław KUC, teknika direktoro de WSZiB (sidanta) kun sia kunlaborantino Agnieszka KOŚCIELNICKA (staranta malantaŭe) montras perkomputile la konferencejajn instalaĵojn al la konferenca teamo de ILEI (de maldesktre): Aida ČIŽIKAITĖ (estrarano pri konferencoj), Maria MAJERCZAK (konsilanto) kaj Małgosia KOMARNICKA (prezidanto de la Loka Organiza Komitato).*

Informis: Atilio ORELLANA ROJAS, ILEI-Sekretario

ILEI konferencos en Krakovo!

Post la sukcesa konferenco en Portonovo, Benino, por 2009 ILEI invitas vin al konferenco en Pollando! Je nur kelkaj horoj en trajno disde la UK-urbo 2009, la iama pola ĉefurbo allogas per unika historia medio pro kiu ĝi listiĝas en la Monda Heredaĵo de Unesco. Jam en 1364 ĝi iĝis universitata urbo, tradicio kiu daŭras ĝis nun – Krakovo havas ne malpli ol 23 altlernejojn kaj univesitatojn! Etoso de studenta urbo kuniĝas kun serioza universitata vivo de unu flanko, kaj multflanka turismo de la alia.

La provinco Małopolska, kies ĉefurbo estas Krakovo, estas ne malpli varia kaj alloga – de la belega naturo kaj vintraj sportejoj de la montaro apud Zakopane ĝis lokoj kun profunda historia signifo. Tra ĝi fluas la rivero Vistulo, ĉe kies bordo oni trovas la faman kastelon Vavelo. Ankaŭ el movada vidpunkto Krakovo estas konata urbo. Eble ne nur ĉar tie estas la sidejo de nia pola sekcio kaj lernejo sub nia aŭspicio, sed ankaŭ pro tio ke ĝi gastigis la Universalajn Kongresojn de E-o en 1912 kaj 1931, la

plej grandan Internacian Junularan Kongreson de TEJO, en 1987, kaj jam de 25 jaroj la aranĝon „Esperantaj Tagoj de Krakovo", organizitan de la Krakova Societo E-o. En 2008 en Krakovo okazis la 16-a IMEK (Internacia Medicinista E-Kongreso).

La pedagogio de E-o antaŭ la defioj de interkultura komunikado
42-a ILEI-Konferenco, 17-25 julio 2009 - Krakovo

La kongresa temo de UEA kaj la konferenca temo de ILEI por la jaro 2009 indikas multe da komuna enhavo kaj samcela orientiĝo, kvankam ili havas en siaj titoloj eĉ ne unu saman vorton krom *la*. La UK-tema slogano *Krei pacan ponton inter la popoloj: Zamenhof hodiaŭ* sintezas en si aktualajn programajn akcentojn de Unesko kaj UN kun la idea esenco kaj praktika valoro de la verko de Zamenhof, omaĝe al lia 150-a naskiĝdatreveno. Dume ILEI koncentras sian atenton al la pedagogiaj aspektoj de la sama temkomplekso omaĝe al sia 60-jariĝo, al la 60-jariĝo de la *Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj* kaj al la *Internacia Jaro de Interpaciĝo 2009*.

La ILEI-konferenca temo *La pedagogio de Esperanto antaŭ la defioj de interkultura komunikado* celas enfokusigi du komplementajn taskojn: edukadon al E-o kaj edukadon per E-o. Tio signifas pluvivigon de la E-komunumo per formado de novaj esperantistoj kaj edukadon al la kulturo de paco kaj senperforta solvado de konfliktoj. Tio signifas flegadon de la sentempaj Zamenhofaj idealoj kaj kreadon de fundamentaj ŝtonoj por la paca ponto inter la popoloj.

Programo

Krom la tema programo estas planataj: Inaŭguro, interkona manĝovespero, Nokto de la Lingvoj, unutaga simpozio laŭ la konferenca temo, komitatkunsidoj, estrarkunsidoj, seminario de *lernu!,* de E@I, de E-literaturo, de InterKulturo kaj por Cseh-instruistoj, kaj diversaj prelegoj de niaj kolegoj kaj invititaj gastoj. Pliaj informoj aperos en venontaj IPR-numeroj, la retpaĝaro de ILEI kaj en la *dua informilo*. Bonvolu anonci viajn proponojn por kontribui al la programo, ambaŭ por la tema kaj por la distra parto.

Konferencejo

La ĉefa konferencejo estas la *La Supera Lernejo de Direktado kaj Bankismo (WSZiB)* en Krakovo, ĉe la strato *Armii Krajowej 8*. Ĝi estas facile atingebla de la stacidomo aŭ urbocentro pere de rektaj tramoj kaj busoj, kaj disponigas al ni grandajn kaj luksajn salonojn.

Ekskursoj

La unua tuttaga ekskurso, marde, nin gvidos al *Zakopane*, la „vintra ĉefurbo" de Pollando. La programo de la ekskurso: montpromenado, veturado per kablofervojo, perkaleŝa promenveturo, torĉoj, montara muziko, varmiga vino, dancado kaj aliaj allogaĵoj. 45 € (inkl. de tag- kaj vespermanĝo).

En la dua tuttaga ekskurso, ĵaŭde, ni unue konatiĝos kun *Wadowice*, la naskiĝvilaĝo de papo Johano Paŭlo la Dua kaj *Kalwaria*. Poste ni atingos *Oświęcim (Auschwitz)* la plej grandan naziisman koncentrejan komplekson, simbolon de la holokaŭsto. La tereno de tiu eksa koncentrejo nun servas kiel memoriga muzeo. Ni vidos dokumentan filmon, la muron de morto, gasĉambron kaj krematorion, punlaborejon. Ĝi apartenas al la UNESKO-listo de Mondaj Kulturaj Heredaĵoj. 45 € (inkl. de tag- kaj vespermanĝo).

En la unua duontaga ekskurso, dimanĉe, ni estos gvidataj perpiede tra Krakovo: promenado laŭ la reĝa vojo, trarigardo de la Malnova Urbo (la barbakano, la preĝejo de Sankta Maria, la draphaloj, la urboplaco, la *Collegium Maius*, la domo de la papo Johano Paŭlo la Dua, la strato Kanonicza, la reĝa kastelo kaj la katedralo sur la monteto Vavelo. 5 €.

La dua duontaga ekskurso, lunde, portos nin al salminejo *Wieliczka*. Ĝi situas proksime de Krakovo kaj estas unika loko, enskribita en la UNESKO-liston de Mondaj Kulturaj Heredaĵoj. Laŭ legendo, salon oni malkovris danke al Sankta Kinga, antaŭ jarcentoj. Multaj ĉambregoj, subteraj lagoj, preĝejoj, koncertejoj, bankedejoj, vendejoj, manĝejoj, eĉ sanigejo allogas turistojn de la tuta mondo. 19 €.

En la tria duontaga ekskurso, merkrede, ni vizitos Niepołomice. Ĝi situas je 25 km sudoriente de Krakovo kaj havas riĉan historion kaj interesajn vidindaĵojn: reĝan kastelon, preĝejon kaj praarbaron. La historio de la urbo komenciĝis en la tempo de la formiĝo de la Pola Ŝtato. La grandioze rekonstruita kastelo iĝis la dua reĝa sidejo post Vavelo. 12 €.

Loĝado

Por loĝado dum la konferenco, ILEI trovis en Krakovo aparte bonajn kondiĉojn. Apud la ĉefa konferencejo, tuj je la alia flanko de la strato, estas du kunlaborantaj ejoj kiuj ofertas kaj studentoĉambrojn kaj hotelĉambrojn. En ***Za Kolumnami*** (strato Armii Krakowej 9) kaj najbara ***Krakowiak*** ni proponas 1-litan hotelĉambron kontraŭ 34 € kaj 2-litan

kontraŭ 25 € por persono. Ambaŭ estas grandaj hoteloj kun lifto. En la hotelaj ĉambroj estas fridujo, akvoboligilo, televidilo kaj senpaga retaliro.
En ***Za Kolumnami*** ni proponas ankaŭ malpli kostajn studentajn ĉambrojn, same kun retaliro kaj fridujo. Ne estas kuirejo, sed eblas pruntepreni akvoboligilon. 1-lita studentoĉambro kostas 22 €, loko en 2-lita 16 €.

Iom pli malmultekosta, sed je 2.7 km de la konferencejo (estas busoj kaj tramoj), estas hotelo ***Żaczek*** (strato al. 3 Maja 5). Ankaŭ ĝi estas moderna hotelo, kun lifto. En hotelaj ĉambroj estas fridujo, akvoboligilo, televidilo kaj senpaga retaliro. Ni proponas 1-litan hotelĉambron kontraŭ 24 € kaj liton en 2-lita hotelĉambro kontraŭ 18 €. Aldone en *Żaczek* estas 3-litaj studentaj ĉambroj, kun duŝejoj kaj kuirejoj en koridoro. Ankaŭ tie estas senpaga retaliro. Loko en 3-lita studentoĉambro kostos 12 €.

Tuj apud la hotelo Żaczek troviĝas studenta hejmo ***Oleandry*** (strato Oleandry 4). En ĝi ni proponas lokojn en 3-4 litaj ĉambroj (9 €) aŭ 6-8 litaj ĉambroj (7 €). En ĝi estas nek lifto, nek retaliro, nek bantukoj. Eblas lui litotukojn kontraŭ 4 zlotoj por semajno aŭ kunporti proprajn. Estas kuirejo, necesejoj kaj duŝejoj en la koridoro.

Proksime al Żaczek kaj Oleandry troviĝas fama kaj luksa hotelo ***Cracovia*** (strato Al. F. Focha 1). Ni proponas 1-litan ĉambron kontraŭ 124 € aŭ lokon en 2-lita ĉambro kontraŭ 83 €. Vi povos (aparte mendende) matenmanĝi ĉu en la hotelo, ĉu kun aliaj konferencanoj en restoracio apud la konferencejo.

Manĝado kaj bankedo

Eblas mendi plenan pensionon por via tuta restado (matenmanĝo, tagmanĝo, vespermanĝo) kontraŭ 15 € tage (en tagoj kiam estos organizitaj malpli ol tri manĝoj: alventago, forirtago, ekskursa tago, tago kiam okazos bankedo) vi pagos rabatitan sumon proporcian al la kvanto de manĝoj. Manĝoj okazos konvene proksime al la konferencejo aŭ ejo kie okazos vespera programo. Dum tuttagaj ekskursoj tagmanĝo kaj vespermanĝo estas inkluzivitaj en la ekskursa prezo. Marde, se vi ne aliĝas al la ekskurso al Zakopane, vi tagmeze kaj vespere memzorgu!

Kompreneble ankaŭ ĉi-jare ILEI organizos la tradician bankedon, merkrede, en etosplena restoracio en la centro de la urbo. Aliĝo al la bankedo kostos 30 € por A-landanoj, 17 € por B-landanoj.

Alveno/foriro

Krakovo estas facile atingebla per komfortaj naciaj kaj internaciaj trajnoj kaj busoj. Ankaŭ estas flughaveno (Krakovo-Balice, flughaveno

„Johano Paŭlo la Dua”) kun multaj malmultekostaj flugoj. Ne malproksime estas ankaŭ la flughaveno de Katowice, kaj de la Varsovia flughaveno eblas atingi Krakovon per buso kaj trajno en 4-5 horoj. ILEI vin akceptos ekde la 17a de julio – unua manĝo estos la 17an de julio vespere. La lasta manĝo estos la matenmanĝo de la 25a de julio, post kiu ILEI proponas komunan vojaĝon al la UK de Esperanto, en Bjalistoko. En la ***dua informilo*** aperos informoj pri tio kiel atingi la hotelojn kaj konferencejon, pri enurbaj busoj, ktp. Ne hezitu kontakti nin se vi jam nun havas pliajn demandojn!

Ĝenerale pri Krakovo kaj Pollando

La averaĝa **temperaturo** en Krakovo en julio estas 23 celsiaj gradoj. Kunporti jaketon por la plej freŝaj noktoj konsilindas. La **elektra tensio** en Pollando estas 220 V, 50 Hz, kiel en preskaŭ la tuta Eŭropo. Ankaŭ la kontaktingoj estas la kutimaj eŭropaj. En Pollando oni uzas **zlotojn** (Zl, internacia kodo – PLN). 1 Zl egalas al 100 groŝoj. La nuna kurzo estas 1 EUR ~ 3,7 PLN. Plej konsilindas preni monon de monaŭtomatoj, kiuj facile troveblas ĉie. Internacie konverteblajn valutojn eblas ŝanĝi en bankoj, monŝanĝejo, grandaj hoteloj. Bonvolu ne ŝanĝi monon en neoficialaj monŝanĝejoj. **Medicinaj servoj** de pluraj landoj havas kontraktojn kun Pollando, surbaze de kiuj eksterlandanoj povas uzi la samajn servojn kiel enlandaj loĝantoj. Bonvolu mem kontroli, ĉu via lando havas tian kontrakton kaj sub kiuj kondiĉoj. Via aliĝo al la konferenco inkluzivas neniun asekuron – bonvolu mem prizorgi asekurpolison. Krakovo kaj aliaj urboj de Pollando estas **sekuraj**, sufiĉas ke oni kondutu laŭ la principoj de sekureco same, kiel en la plejmulto de turismaj lokoj.

Kiel aliĝi

Por helpi al la organizantoj eviti erarojn, bv aliĝi al la konferenco pere de la reta aliĝilo je http://ilei.info/konferenco/alighilo2009.php – tiel vi mem plene respondecos pri la ĝusteco de viaj datumoj. La reta aliĝilo por vi kalkulos la plenan aliĝkotizon. Se vi ne havas retaliron, vi povas uzi la ĉi-aldonan paperan aliĝilon – tiukaze ni sendos al vi fakturon laŭ kiu vi pagu. Kiel aliĝdato en ajna kazo validas la **dato de alveno de via pago** ĉe ILEI. **Aliĝilo sen kompleta pago ne estos valida.**

Kiel pagi

Sendepende de via pagmaniero, bonvolu tuj, kiam vi faras vian pagon, informi la kasiston: *Sjoerd BOSGA, Tråddragargatan 27 D, SE-72337 Västerås, Svedio*, <*sjoerd@esperanto.se*>.

Vi povas pagi jene:

1. El Eŭropa Unio, prefere pagu per t.n. EU-pago al la konto de ILEI en Svedio: ILEI, IBAN: SE56 8000 0832 7999 4515 0143, BIC/SWIFT: SWEDSESS. Aldonu 6 € por svedaj bankokostoj se vi pagas de *ekster* Eŭropa Unio. El Svedio eblas pagi al konto 8327-9, 994 515 014-3 ĉe Swedbank;
2. Al ILEI-konto ĉe UEA, ilek-a, indikante: „ILEI-Konferenco 2009", nur ĝis la 15-a de majo 2009;
3. Ene de Pollando, nur por poloj, al la konto de la Pola Sekcio de ILEI, 82 1940 1076 3059 0661 0000 0000, LUKAS Bank Kraków, ul. Królewska 94. Bonvolu kontakti la sekcian kasiston: Magdalena TATARA, Kozmicie Wielkie 323, PL-32-020 Wieliczka, <*mtatara@gmail.com*>, tel. + 48 665 310609.

Aliĝkotizo

La baza aliĝkotizo dependas de la landokategorio kaj aliĝdato de la aliĝanto. Estas du landokategorioj:

1. Ĉiuj landoj escepte de tiuj ĉi-sekve sub B.
2. Iamaj socialismaj landoj de la orienta Eŭropo; ĉiuj landoj de Azio (escepte de Israelo, Japanio kaj Korea Resp.) kaj Latinameriko.

Aliĝperiodo:	ĝis 31.03.09	ĝis 30.06.09	post 30.06.09
Aliĝkategorio:	A / B	A / B	A / B
Membro de ILEI[1]	50 € / 30 €	60 € / 36 €	70 € / 42 €
Ne-membro de ILEI	63 € / 38 €	75 € / 44 €	88 € / 53 €
Junulo[2], handikapulo[3]	25 € / 15 €	30 € / 18 €	35 € / 21 €

1. Membro estas tiu, kiu jam pagis kotizon al ILEI por la jaro, kiam okazas la konferenco;
2. Junulo estas konsiderata tiu, kiu naskiĝis post la 31-a de dec. 1978.
3. Bonvolu sendi al ILEI atestilon.

Aliĝkotizo por unu tago estas 25 € por A- kaj B-landoj.

Kondiĉoj pri pagoj kaj repagoj

La aliĝkotizo ne inkluzivas ajnan asekuron, loĝadon, manĝojn, ekskursojn kaj aliajn eventualajn aparte pagendajn aferojn, pri kiuj informoj kaj mendiloj aperas en IPR aŭ/kaj en la retpaĝaro de ILEI. Por

mendoj validas la prezoj menciitaj en tiu ĉi aŭ postaj informiloj, aŭ ILEI-retpaĝoj. Por mendoj atingantaj nin post la 20a de aprilo 2009 aliĝanto devas aldone pagi 10% de la sumo por la mendataj servoj. Post la 15a de majo ni ne plu povas al vi garantii mendon de tranoktejo.

50% de la aliĝkotizo kaj 80% de la sumo por mendoj estas repagotaj, se aliĝinto malaliĝas pro valida kaŭzo antaŭ la 15-a de junio 2009. Malaliĝinte pro valida kaŭzo antaŭ la 1-a de julio 2009, aliĝinto rericevos 60% de la sumo por mendoj, sed ne la aliĝkotizon. Malaliĝinte pli poste, aliĝinto ne ricevos ajnan repagon. Kaze de ne-okazigo de ekskurso (ekz. pro ne sufiĉa kvanto de aliĝantoj), la pagita sumo por la koncerna ekskurso estas repagota. Konferencaneco estas transdonebla, sed necesas alpagi la diferencon depende de la lando kaj aliĝperiodo. ILEI ne repagas la diferencon kaze de transdono al aliĝanto en malpli kosta kategorio.

Ekstrakto el la konferenca regularo:

6. Konferencanoj devas fari nenion, kio kontraŭas la Konferencan Regularon aŭ malutilas al la ILEI-Konferenco, kaj devas submetiĝi al la leĝoj de la lando, kie okazas ILEI-Konferenco.
7. Ĉiu vendado de varoj en ILEI-Konferenco bezonas antaŭan aprobon de la Estraro, kiu starigas la kondiĉojn. Skriba peto pri tia agado estu liverita al la Estrarano pri Konferencoj nepre antaŭ la 30-a de junio de la konferenca jaro.

Plie legeblas: *http://www.ilei.info/dok/regularo_konferencoj.rtf*

Subtenu aliajn

Kiel kutime, ankaŭ ĉi-jare ni petas vin laŭeble subteni nepagipovajn kolegojn kaj la agadon de ILEI ĝenerale. Vi povos aldone al via aliĝo donaci al la *Koleghelpa Fonduso* (per kiu ILEI membrigas ne-pagipovajn instruistojn), al la *Fonduso Dazzini* (subteno al ne-pagipovaj partoprenantoj de konferenco), al la konferenca kaso ktp. Indas subteni ankaŭ la zadon de nova seminario en Afriko, planata por julio 2009 en Kinŝaso.

Kontakto

Bonvolu neniam skribi al la konferencejo, sed nur al la estrarano pri konferencoj: Aida ČIŽIKAITĖ, Kapinių 11-15, LT-50189 Kaunas, Litovio; <*aiduze@gmail.com*>; tel. +43 664 3682299, aŭ al la loka ĉeforganizanto *Małgorzata J. KOMARNICKA*, ul. Kilińskiego 14 m 3, PL-59-300 Lubin, Pollando, <*margareta.ilei.pollando@gmail.com*>, tel. +48 603318 149. La plej aktualaj informoj ĉiam aperos en <*http://ilei.info/*>.

42a konferenco de ILEI - Krakovo 2009

Aliĝilo

Nomo: _____

Mi estas
◯ virino ◯ viro

Strato, n-ro: _____

Kodo, urbo: _____

Lando: _____

Mi estas
◯ membro
◯ ne-membro
◯ junulo
◯ handikapulo

Tel.: _____ Retadreso: _____

Naskiĝdato: _____ Profesio: _____

Loĝado

Mi mendas liton en:

Za Kolumnami/Krakowiak
◯ 1-lita hotelĉambro (34 €)
◯ 2-lita hotelĉambro (25 €)
◯ 1-lita studentoĉambro (22 €)
◯ 2-lita studentoĉambro (16 €)

Oleandry
◯ 3-4 lita studentoĉambro (9 €)
◯ 6-8 lita studentoĉambro (7 €)

Żaczek
◯ 1-lita hotelĉambro (24 €)
◯ 2-lita hotelĉambro (18 €)
◯ 3-lita studentoĉambro (12 €)

Hotelo Cracovia
◯ 1-lita hotelĉambro (124 €)
◯ 2-lita hotelĉambro (83 €)

Mi volas loĝi kun: _____

Manĝado

Mi mendas por mia tuta restado:
◯ kutimajn manĝojn (15 €/tago)
◯ vegetarajn (15 €)
◯ specialajn (15 €): _____

Prezoj por loĝado kaj manĝado estas por unu diurno. Ni sendos al vi fakturon por la tuta konferenco. Via aliĝo validas post pago de la fakturo.

Alveno/foriro

Mi alvenas je (dato): _____

Mi foriras je (dato): _____

◯ Mi aliĝas al komuna vojaĝo al UK (20 €)

Akceptado estos la 17an de julio. Unua manĝo okazos la 17an vespere. Lasta manĝo okazos la 25an de julio matene.

Invitilo

◯ Bonvolu sendi al mi invitilon!

Pasportnumero: _____

Valida ĝis: _____

Ekskursoj, bankedo

Mi aliĝas al: ◯ Bankedo (30/17 €)
◯ Promene tra Krakovo (DT1, 5 €)
◯ Salminejo Wieliczka (DT2, 19 €)
◯ Niepołomice (DT3, 12 €)
◯ Zakopane (TT1, 45 €)
◯ Wadowice kaj Aŭŝvico (TT2, 45 €)

Viaj kontribuoj kaj komentoj

En Lingva Festivalo mi ŝatus prezenti: _____

Mi proponas jenan kontribuon al la programo (tema aŭ distra): _____

Por mia prezento mi bezonas: _____

Mi havas jenan apartan bezonon/peton: _____

Subskribo

◯ Mi legis, komprenis kaj akceptas la aliĝkondiĉojn.
◯ Mi akceptas, ke mia nomo aperu en listo de aliĝantoj en la reto, kaj ke miaj nomo, adreso, telefono aperu en listo de partoprenantoj.

Loko, dato: _____ Subskribo: _____

Paperan aliĝilon bonvolu sendi al:
Sjoerd Bosga, Tråddargargatan 27d, SE - 72337 Västerås, Svedio,
sed prefere aliĝu rete je: *http://ilei.info/konferenco/alighilo2009.php*

LABORKOMISIONOJ

Ekzamena: Mireille Grosjean (Prezidanto), Reza Torabi (Sekretario), Julián Hernández Angulo, Antonio Leoni de León, Oliver Mazodze, Mónika Molnár

Elekta: Tieko Isikawa, Ana Montesinos de Gomis, Aurora Bute

Kontrola: Ulla Luin, Bengt Jonsson, Marianne Westman

Lerneja: Carola Antskog, Jennifer Bishop, Ronald Glossop, Tieko Isikawa, Luigia Madella, Ermanno Tarracchini, Mihai Trifoi

Regulara: Marija Beloŝeviĉ, Rob Moerbeek, Atilio Orellana Rojas

Terminara: Maŭro La Torre, Miroslav Malovec

KUNLABORANTAJ INSTITUCIOJ

EEU: *Eŭropa Esperanto-Unio*. Komisiito pri instruado kaj rilatoj kun ILEI: **Carola Antskog**, Brokärrvägen 89, FI-25700 Kimito, Finnlando, *cantskog@kolumbus.fi*

E@I (*Esperanto ĉe Interreto*, *www.ikso.net*): faka sekcio de **TEJO** (poŝtadreso ĉe UEA).

FIPLV *(Internacia Federacio de Instruistoj de Vivantaj Lingvoj):*
Reprezentanto de ILEI: **Jennifer Bishop**, *esperanto@Education.monash.edu.au*

IEI: *Internacia Esperanto-Instituto, Riouwstraat 172, NL-2585 HW Den Haag, Nederlando.*

TEJO: Observanto de TEJO ĉe ILEI: **Gregor Hinker** (*http://www.tejo.org/*).

UEA: *Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando*. *www.uea.org*. Observanto de ILEI ĉe UEA: **Radojica Petrović**. A-komitatano el ILEI: **Atilio Orellana Rojas**. Observanto de UEA ĉe ILEI: **Claude Nourmont**. Reprezentanto de ILEI en la Afrika Komisiono de UEA: **François Hounsounou**

UNESKO (en neformalaj rilatoj): Reprezentantoj de ILEI**: François Lo Jacomo**, *72, quai de la Loire, FR-75019 Paris, francois.lojacomo@wanadoo.fr*; **Monique Arnaud**, *Ecole Chemin de l' Espéranto, Les Pelloux, FR-05500 Benevent et Charbillac, monique.arnaud@tiscali.fr*; **Jean-Pierre Boulet**, *17 Av. de la Dordogne, FR-63800 Cournon d'Auvergne, tel.: (+33) 4 73 84 90 60*; **Mireille Grosjean**, *Temple 20 pf. 9, CH-2416 Les Brenets, tel/fakso: (+41 32) 932 18 88*, *mirejo.mireille@gmail.com*

MEMBRIĜO AL ILEI KAJ PAGADO POR ALIAJ SERVOJ

Membreco kostas 18 EUR en A-landoj (laŭ UEA-difino) kaj 9 EUR en B-landoj, kun ricevo de 4 numeroj de IPR jare. Kun aliro nur al reta versio, membreco kostas 4 EUR (A) kaj 2 EUR (B). Bonvenaj estas donacoj al la fondaĵoj de ILEI, konferencaj pagoj kaj abonoj por Juna amiko. Sekciestroj en trideko da landoj akceptas membrigojn kaj donacojn; simile, perantoj por Juna amiko akceptas abonojn enlande. Por pagoj rekte al la internacia ILEI informu skribe al la kasisto de ILEI: **Sjoerd Bosga**, *Tråddragargatan 27D, SE-723 37 Västerås, Svedio. Tel.: (+46 21) 41 70 45, sjoerd@esperanto.se.*

La pagoj povas okazi pere de konto de ILEI ĉe UEA, aŭ al la sveda konto.

* Pagoj al konto de ILEI ĉe UEA: Pri pagmanieroj vidu informojn en la Jarlibro de UEA. Atentu pri aldono de sumo por bankkostoj. Indiku vian nomon kaj landon, mallonge la celon de la pago, kaj unu el la tri kontoj ilek-a (ĝenerala), juna-l (Juna amiko), pike-b (projekto Interkulturo).

* Pagoj al la sveda bankkonto: El Svedio pagu al konto 8327-9, 994 515 014-3 ĉe Föreningssparbanken. El aliaj landoj pagu al IBAN SE56 8000 0832 7999 4515 0143 kun BIC/SWIFT kodo SWEDSESS. Aldonu 6 eŭrojn por svedaj bankkostoj se vi pagas el ekster Eŭropa Unio.

* Simpla abono de IPR sen membreco: 18 EUR. Reklamtarifoj por IPR: 180 EUR por plena, 110 EUR por duona kaj 70 por kvarona paĝoj. Tio inkluzivas bazan grafikan pretigon: kostojn de ekstra pretigo oni rajtas fakturi. Sekcioj reklamante edukajn projektojn rajtas peti trionan rabaton.

ILEI estas jure registrita ĉe la Komerca Ĉambro en Den Haag sub numero 27.181.064.

Hejmpaĝo de ILEI: *http://www.ilei.info*.

REDAKCIAJ INFORMOJ

Respondeca eldonanto (verantw. uitgever): Iwona KOCIĘBA*, Graaf de Fiennesln 54, BE-2650 Edegem.*

Presado: Flandra Esperanto-Ligo, *Frankrijklei 140, BE-2000 Antwerpen, tel: (+32-3)-234 34 00.*

Redaktejo: NÉMETH József, *HU-8531 IHÁSZ, Fő u. 41/5*. Rete: <*jozefo.nemeth@gmail.com*>, *http://www.ilei.info/ipr/;* tel*: (+36-89) 356-050.* La revuo aperas ankaŭ kasede registrita por leghandikapuloj.

Informas: Rob MOERBEEK*, Zwaansmeerstraat 48, NL-1946 AE Beverwijk*, <*r.moerbeek@wanadoo.nl*>.

SEKCIOJ

Albanio: Vasil Pistoli, c/o Bardhyl Selimi, Rr. Maliq Muco, Pall. 50, ap. 3, AL-Tirana, *selimibardhyl@yahoo.com*

Aŭstralio: Penny Vos, 14 Candelo St, AU-2550 Candelo NSW, *penivos@yahoo.com*

Belgio: Iwona Kocięba, Graaf de Fiennesln 54, BE-2650 Edegem, *iwona.kocieba@telenet.be*

Benino*:* François Hounsounou, BP 226, BJ-Lokossa-Mono, *hounfranc@yahoo.fr*

Brazilo: *vakas geinstruistoj@ileibr.org*

Britio: Tellier Angela, 10 Marina Gardens, GB IP11 2HW Felixstowe, Suffolk, *angela@esperantoeducation.co.uk*

Ĉeĥio: Jana Melichárková, CZ-696 02 Ratíškovice 938, *melicharkova@quick.cz*

Danio: Arne Casper-Mortensen, Bryggervangen 70, 4. tv. DK-2100 Kobenhavn, *arnecasper@dbmail.dk*

Finnlando: Carola Antskog, Brokärrvägen 89, FI-25700 Kimito *cantskog@kolumbus.fi*

Francio: Michel Dechy, 65 allée de la Crémaillère, FR-59650 Villeneuve d'Ascq, *michel_dechy@hotmail.com*

Germanio: Zsófia Kóródy, E-Centro, Grubenhagenstr. 6, DE-37412 Herzberg/Harz, *zsofia.korody@esperanto.de*

Hungario: József Németh, Fő u. 41/5, HU-8531 Ihász, *jozefo.nemeth@gmail.com*

Irano: Hamzeh Ŝafii, P.O. Kesto 17765-184, IR-Teheran, *hamzeh@esperanto.org*

Italio: Luigia Oberrauch Madella, via Prampolini 8, IT-43100 Parma, *silkovojo@aliceposta.it*

Japanio: Isikawa Tieko, 103, Tate 1-6-6, Siki, Saitama JP-353-0006, *isksanjo@ff.e-mansion.com*

Katalunio: Pedro M. Martin Bututxaga, Arnau Gatell 2-4-2, ES-17300 Blanes, *pmarti10@xtec.cat*

Korea Resp.*:* CHO Sung Ho, Department of Biology, Inha Universitato, Incheon KR-402-751, *shcho@inha.ac.kr*

Kroatio/KEL: Marija Jerković, Jarunska 6, HR-10000 Zagreb, *mjerkovic@net.hr*

Kroatio/KEU: Ivan Bekavac-Basić, Kušlanova 59, HR-10000 Zagreb, *ilei@hes-keu.hr*

Kubo: Marta Alonso Gutiérrez, Malecón 659 entre Belascoaín y Gervasio; CU-10200 Ciudad de La Habana, *kubesp@enet.cu*

Nederlando: Atilio Orellana Rojas, Riouwstraat 172, NL-2585 HW Den Haag, *iesperanto@versatel.nl*

Norvegio: Anne-Karin Bondhus, Morenefaret 8A, NO-4340 Bryne, *akbondhus@jkn.no*

Pollando: Piotr Nosek, ul. Zbrojów 10/8, PL-30 042 Kraków, *piotr.esp@gmail.com*

Rumanio: Mihai Trifoi, Str. Principala Bl.1 Ap.3, RO-527116 Bixad/Jud. Covasna, *trifoi@honoris.ro*

Rusio: Irina Gonĉarova, Moloeznaja 38-10, Odincovo 2, Mosk. obl. RU-143000, *mirina@online.ru*

Svedio: Agneta Emanuelsson, Carl Ugglas väg 6, SE-641 37 Katrineholm, *agi.emanuelsson@telia.com*

Svislando: Mirelle Grosjean, Grand-rue 9. Pf. 9, CH-2416 Les Brenets, *mirejo.mireille@gmail.com*

Togolando: Attiogbe-Agbemadon B., Mensah, T.I.E.To, B.P. 13169, Lome-TOGO, *esp.togo@cafe.tg*

Ukrainio: Nina Daniljuk, prospekt Sobornosti 32-108, UA-43026 Luck-26, *nina_daniljuk@ukr.net*

Usono kaj **Kanado:** Doroteo Holland, 5140 San Lorenzo Dr, Santa Barbara, CA 93111-2521 (US), *dorothyh77@gmail.com*

REPREZENTANTOJ

Armenio: Lida Elbakjan, Moldovakan 26/2, kv.52, AM-375062 Erevan, *LIDELB@freenet.am*

Barato/Hindujo: Venkatesh Reddy, No. 216, Off main Road, Whitefield, Bangalore 66, Karnataka, *esperovr@yahoo.co.in*

Bosnio kaj Hercegovino: Nimeta Kulenovič, Branica Sarajeva 15/V, BA-71000 Sarajevo

Ĉilio: Héctor Campos Grez, Casilla 903, CL-3340000, *hecg@uea.org*

Estonio: Helgi Hromova, Pk. 623, EE-12602 Tallinn

Islando: Loftur Melberg Sigurjónsson, Traðarberg 13, IS-221 Hafnarfjörður, *loftur@skyrr.is*

Israelo: Gian Piero Savio, 13/4 Menora-str. IL-53490 Givatajim, *saviogp@zahav.net.il*

Kongo DR: Ngangu Nduantoni-Bakidila, B.P.13, CD-Lukala, Bas-Zaïre

Kostariko: Hugo Mora Poltronieri, Apartado 4981, CR-1000 San José, *tikoguau@gmail.com*

Litovio: Algimantas Piliponis, Kavoliuko 3-93, LT-04325 Vilnius, *piliponis@centras.lt*

Meksiko: José de Jesús Corrales C., Belice 116, Fraccionamiento Guadalupe, Durango, Dgo. *jdjcorrales@yahoo.com.mx*

Nov-Zelando: Gwenda Sutton, 12C Herbert Gardens, 186 The Terrace, NZ-6001 Wellington 1, *gwenda.s@ihug.co.nz*

Serbio: Radojica Petrović, Bul. oslobodjenja 36, RS-32000 Ĉaĉak, *radp@ptt.yu*

Uzbekistano: Eugeno S. Perevertajlo, Abon. jashik 140, Poĉtamt, UZ-700000 Taŝkento, CIS, *esperuzo@mail.ru*